Österreichische Nationalbibliothek
Zeitschriftensaal

AŬSTRIA

# ESPERANTO-REVUO

*Oficiala organo de la austria Esperanto-movado*
*Offizielles Organ der österreichischen Esperanto-Bewegung*
*Aperas monate*
*Redakcio kaj administracio: Vieno I., Neutorgasse 9, Austrio. — Telefono U 20-3-51*

*NRO 3-4*
*2-a JARO*
*MARTO-APRILO 1947*

## EL LA ENHAVO:

Du malbonaj spiritoj.
S.A.T. emas kunlabori.
Legendoj ĉirkaŭ Lenin.
Rekonstruado en sfero katolika universala.
Funebra parolado de Grillparzer ĉe la tombo de Beethoven.
Raportoj el la aŭstria kaj internacia Esperanto-movadoj.
Bibliografio.

## *LASTA INFORMO:*

La ĉi-jara ĝenerala kunveno de la Aŭstria Esperantista Federacio okazos de la 15a ĝis la 17a de Aŭgusto 1947 en Kufstein. Detaloj sekvos.

*AUSTRIA ESPERANTO-REVUO oficiala organo*
*de Austria Esperantista Federacio kaj de Austria Esperanto-Instituto*
Adreso: Wien I., Neutorgasse 9, Austrio
**Abonprezo:** Jarabono aŭstr. ŝil. 10.— aŭ 1 dolaro aŭ egalvaloro.
Por membroj de AEF senpage.

# Korespondado

Kiu volas korespondi kun en- aŭ eksterlandaj esperantistoj, sendu sian korespondpeton al la redakcio de A.E.R. Ni publikigos ĝin laŭ la disponebla loko.

Unua korespondanonceto dulinia por AEF-anoj senpage. Plua anonceto kaj por aliaj personoj kostas ŝil. 2.—, por eksterlandanoj 4 int. respondkuponojn. Ni petas, la adresojn nepre skribi bone legeble!

**Aŭstrio.** — Diversaĝaj novaj geesp-istoj el multaj lokoj de Tirol deziras korespondadon tutmondan. Bonvulo indiki vian aĝon. Skribu amase al s-ro Hans Steiner, Kirchbichl, Tirol.

S-ro Georg Loczi, Böckstein 8, Salzburg, 30 j. instruisto, let. kun ĉ. landoj pri spiritaj temoj.

S-ro Rudolf Bouche, Wien V, Rechte Wienzeile 93/2/3/27, serĉas urĝe vortaron de Bennemann, parto Deutsch-Esperanto, ev. ambaŭ partoj. Indiku viajn kondiĉojn.

S-ro Franz Kraus, Vieno XIII,Erzbischofgasse 8 ĉapelfaristo 1. kun ĉ. 1. pri ĉ. temoj, ŝanĝas gazetojn, librojn ktp.

S-ro Hans Bronec, Vieno III, Baumgasse 33, 35/3/8, leteroj kun ĉ. landoj pri ĉiuj temoj.

Letervesperon aranĝas fine de Junio „Laboro", Fakgrupo de popolkleriga instituto Währing, Vieno XVIII., Schopenhauerstraße 49, Aŭstrio. Respondos certe, kvitancos per pm. kaj il. pk.

Letervesperon aranĝos fine de Junio: Esperanto-Kurso por progresantaj en Popolkleriga instituto Alsergrund, Vieno IX., Galileigasse 8, Aŭstrio. Respondos certe, kvitancos per pm. kaj il. pk.

S-ro Lois Ensmann, Salzburg, Dreifaltigkeitsgasse 4/3, elektristo, kor. pri fakaj kaj ekonomiaj temoj kun ĉ. 1.

**Brazilio.** — S-ro Miguel A. F. de Silva, Rua Domingos de Magalhaes 1317, Caxambi-Meyer, Rio de Janeiro, D. F., kor. kun aŭstriaj SAT-anoj pri tekniko, socialaj problemoj, lab. movado ktp.

**Bulgarujo.** — S-ro Rale Nikolov, nina „Tchumerna", Slivensko, 26 j., korespondas kun aŭstriaj ges-anoj.

**Ĉehoslovakujo.** S-ro Stefan Vareha, Ostrava Vitkovice, Prhranicini 33, juna s-ano, kor. kun aŭstria s-an(in)o pri ĉiuj temoj.

**Francujo.** — S-ro Jullien Georges, 3 Impasse des Literous, Denain-Nord, korespondas kun aŭstriaj ges-anoj.

S-ro Alex Lange, 4. Rue Cartault, Puteaux (Seine),62 j. metallaboristo kor. kun aŭstriaj ges-anoj.

**Germanujo.** S-ro Erwin Grüger (21 b), Werl, Kreis Soest, Hammerstraße 39, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

S-ro Ulrich Hollenbach, Linz am Rhein, Oberlöh 8, Land Rheinland-Pfalz, franca Z., dez. kor. kun ĉiuj langoj.

S-ro Georg Mehlhorn (10 b), Chemnitz, Gießerstraße 41, II, 52 j. edz. komercisto, kun aŭstria (san(in)o pri ĉiuj temoj.

**Nederlando.** S-ro C. Dikstaal, Veenenlaan 135, Hoorn, interŝanĝas leterojn kaj PK.

**Rumanujo.** S-ro Alex Vass, Baia Mare, str. Nisiparilov 5, 27 j., edz. ĉambropentristo kor. kun samfakulo aŭ alia aŭstrian(in)o.

**Svedujo.** — F-ino Maja Rosen, Landvetter, Svedujo, kor. kun aŭstr. ges-anoj.

AŬSTRIA

# ESPERANTO-REVUO

2-a jaro MARTO / APRILO 1947 n-ro 3—4

## Du malbonaj spiritoj

Du jaroj jam estas pasintaj depost la fino de la plej terura el ĉiuj ĝisnunaj militoj. Sed ankoraŭ ni ne vivas en stato de paco. La homaro estas tro profunde agitita. La memoro estas ankoraŭ tro akrafreŝa pri ĉiuj teruroj, kiuj multaj plene montriĝis nur poste. Ja kiel ni povus esti trankvilaj? La mortstertoro de milionoj da viktimoj malhome buĉitaj ankoraŭ eĥadas en la aeroj, la senfruktigita tero estas ankoraŭ ne seka de ilia sango sorbita abunde kontraŭ la vejnoj de la naturo, kaj la fia spirito de la perfortemo, de la venĝo kaj revenĝo ankoraŭ regadas super ni. Ni kelkfoje emus fermadi l'okulojn kaj kovri l'orelojn, sed helpas nenio, ni ne povas elturni nin de la tragikaj sekvoj de tiu „totala" militego. Ili ĉirkaŭas nin en krimokaŭzita persisto. Kiel diras la poeto: „Jen estas la malben' de la malbona faro, ke ĝi, plu efikante, nepras naski ĉiam novajn nur malbonojn." La malbonoj de l'milito kaj de l'militemo, kaj la materiaj kaj la spiritaj, daŭras plu. Kvazaŭ inkubo ili kaŭras en ĉiuj anguloj,grimacas el la ruinoj de niaj bombdetruitaj domoj, plendrigardas el la kavaj okuloj de niaj malsufiĉe nutritaj infanoj, balbutas el la kripligitaj organoj de niaj invalidoj, veĝemas el la neaŭdeblaj buŝoj de niaj malproksime retenitaj militkaptitoj kaj el la senkonsolaj koroj de sennombraj orfigitaj parencoj, ribelkrias akuze el miloj kaj miloj da senhejmigitaj perfortitaj aŭ fortrenitaj senhavuloj, resume el la amare-mute aŭ senespere-spite kritikanta plendado de multaj grandaj kaj malgrandaj popoloj, suferantaj, mizerigitaj, timigitaj kaj preskaŭ sklavigitaj.

Ĉiu, kies korsento ankoraŭ ne tute agaciĝis, povas aŭdi tiujn laŭtajn aŭ mutajn, sed ne ignoreblajn lamentojn de esence turmentita homaro. Ho kial? Pro kio? Kiel povis okazi, ke tia lavango de kruelo kaj abomeno verŝiĝis super la tutan teron? Ĉu vere nur kelkaj unuopuloj estas kulpaj, kiuj kvazaŭ sorĉe fikapablis viktimigi milionojn da senkulpaj popolanoj?

Efektive ja estas grandega diferenco inter la „gvidinto" de la germana Tria Regno, liaj kunregintoj kaj la simplaj, misgviditaj

regnanoj kaj la aliaj perforte aligitaj popoloj. Tamen la kulpego de la estroj ne estas sen radikoj en la popolo, alie ili ne estus povintaj ekregi kaj tiel fie regadi. La popolo almenaŭ komence konsentis kaj toleris iliajn delogajn entreprenojn.

La radikoj, pri kiuj mi parolas, estas antaŭ ĉio du malbonaj spiritoj, pli-malpli parazitantaj en ĉiu homa animo: estas la tro-regemo ĝis perfortemo kaj — la rapidemo. Pri la unua, kiu celas fari sin reganta super aliaj, kaj se ili ne volas sekvi laŭ persvado, obeigi ilin perforte, mi ne bezonas multe klarigi. La konata maksimo „Se vi ne volas esti mia frato, mi devigos vin per bato!" estas bedaŭrinde ankoraŭ tro multe adorata. Estas ia deloga vanteco de la homa energiemo, prapeko bone konata, tamen ne sufiĉe atentata kaj ne sufiĉe kontraŭbatalata en niaj kadukiĝintaj sistemoj de edukado kaj politika vivo. Ni ne scias nun, aŭdinte novajn aspirojn, ĉu la bonintenca entrepreno de UNESCO povos sukcese kontribui al la sendanĝerigo de tiu ĉi pereiga monstro insidanta pli-malpli profunde en ĉiuj homaj koroj.

Tiu ĉi unua malbona spirito estas la kaŭzanto kaj direktanto de ĉia terurado. La duan malbonan spiriton, la rapidemon, vi eble ne konas tiel bone; sed ĝi fakte disponigas la rimedojn aŭ ilojn, sen kiuj la unua ne kapablus pereigi tiel grandegan nombron da homoj en tiel mallonga tempo.

Ĝi konjekteble naskiĝis el la malkvieteco de la homa koro, ne kontenta pri la natura ĝuado de l' vivo. Ĝi aspiris pli kaj pli rapide atingi la vantajn celojn de sia regemo. Do ĝi igis la cerbon cerbumi kaj tiu ĉi kreis la diversajn teknikajn ilojn, instrumentojn kaj aparatojn por labori kaj movi sin ĉiam pli rapide. Jam la primitivaj popoloj inklinegas moviĝi kiel eble plej rapide en furioza, ekstaza dancado. Kaj ankaŭ niaj infanoj deziregas moviĝi kiel eble plej rapide sur karuseloj kaj glitveturiloj. Ne mirige do, ke niaj trafikiloj ĉiam pli rapidiĝis: fervojo, aŭtomobilo, aviadilo.

Sed la tuta rapidemo jam deorigine ne servas al bonaj celoj: ekstermi malamikon pli rapide per sago ol per bato, kaj nun per aertransportitaj bomboj anstataŭ per pafitaj kugloj. Maria Ebner-Eschenbach, unu el la plej bonaj virinoj iam vivintaj, diris proksimume jenon: „Se la aviadiloj ĵus elpensitaj, nur servos por pli-rapidigi kaj pli terurigi la militon, estus pli bone, se ili tute ne estus inventitaj!" Efektive la malmultegaj okazoj, en kiuj aeroplanoj alportis savon al homaj vivoj en danĝero, ne estas kompareblaj kun ilia multmilionfoja uzado por celoj pure militaj kaj detruaj.

La perfortemo mortigas kaj la rapidemo detruas. Ili ebligas al la plej krudaj reprezentantoj de la homa raso fariĝi gvidantoj, unue

adorataj, fine abomenataj. La egoisma perfortemo kaj la senpripensa rapidemo de la popolo ilin apogas.

Ho kial, vi homoj, tia rapidemo? Vi sufiĉe rapide atingos la tombon, kaj vi ne savas vin, sendante homfratojn en tombon pli frue. La rapidemo nur malsanigas viajn nervojn kaj maltrankviligas vian tutan vivon. Ĝi estas instrumento diabla, same kiel la perfortemo estas peka vojo, por ke nepre atingu sian vantan celon tiuj homoj tro regemaj, kiuj per siaj spiritaj kapabloj ne sukcesas atingi natursufiĉan regadon super sia ĉirkaŭantaro.

Tial, por eviti estontajn militojn, ne sufiĉas la devizo „For la batalilojn!“ sed ni devas voki, preĝi kaj antaŭ ĉio mem provi kaj peni por forigi el niaj animoj ĉian perfortemon kaj firapidemon. Ni devas anstataŭigi tiujn malbonajn spiritojn per iliaj pozitivaj kontraŭrimedoj: la a m o kaj la p a c i e n c o. La amo ne allasas perforton, ĉar ĝi neniam celas regemon kontraŭ aliaj, sed sole sinregadon kaj helpon liberan al aliaj; kaj la pacienco ne allasas firapidemon, sed ĝi ne esceptas fervoron kaj progresemon por humanaj, kulturaj celoj en socie taŭgaj, civilaj formoj, kiuj respektas la malsamajn kondiĉojn de fremdaj animoj.

Ni esperantistoj scias, per la „interna ideo“ instruita de nia nobla Majstro, ke la bono povas neniam venki per perforto kaj neniam sur vojo rapida; ĉar oni ne povas movi homan animon tiel facile kiel sagon aŭ bombon; sed la bono venkas nur per senlima amo kaj per senfina pacienco.

Tiujn maksimojn ni devas ne nur kredi kaj propagandi, sed ni devas ilin mem sincere efektivigi en nia vivo. Ĉar nur tiu rajtas aferojn pli bonajn prediki, kiu scipovas per propraj faroj ilin ekzemple efiki!

E. W.

---


## ATENTU!

La **ESPERANTO-CENTRO** en Vieno,
I, Neutorgasse 9,
kun: Austria Esperantista Federacio,
Austria Esperanto-Instituto,
Societo de la amikoj al Esperanto,
Esperanto-eldonejo kaj librovendejo
„Tramondo“
estas de nun malfermita
**ĉiutage, ankaŭ sabate, de la 9a—12.30 kaj 13.30—18h.**
Vi povas ĉiam viziti ĝin por informi vin,
aĉeti aŭ mendi librojn k.t.p.

# S. A. T. emas kunlabori

En numero 1/1947 „Sennaciulo“ fruntpaĝe ekstrakte represis nian artikolon „Kie restas S.A.T.?“ (Aŭstria Esperanto-Revuo, n-ro 4-5/1946) kaj aldonis jenan respondon:

Do, per tiu ĉi pledo por unueco en la E-movado, ni konstatas, ke la aŭstriaj esperantistoj estas organizitaj en unu asocio kaj ĝis nun kun bonaj sukcesoj. Sed laŭ A. B. tiu asocio ne estas neŭtrala, sed supertendenca. Tamen ne okazas aliaj diskutoj en la kunsidoj ol pri la demandoj kiel prosperigi Esperanton. Teorie tio ŝajnas tiom simpla kaj tiom facila, sed praktike la afero ne estas tia. Regas klasoj en la mondo kaj regas diversaj politikaj konceptoj, pri kiuj la L.E.A.-o estas pli granda ol la aliaj kune. Kaj tiu prospera situacio ne estiĝis malgraŭ tiu „divideco“, sed sendube pro ĝi. Ĉar ĉiu organizo prilaboras sian propran terenon: la katolikoj pendigas siajn afiŝojn en la portaloj de la preĝejoj, la laboristoj klopodas varbi precipe inter laboristoj pere de la socialistaj instancoj kiel partio, sindikatoj aŭ laborista Radio-Asocio ktp. Sed ne temas ĉe ni pri dissplitiĝo en la malbona senco de la vorto, ĉar tie, kie necesas, ni agas kune, kaj por tio fondiĝis centra komitato, kiu reprezentas kvar landajn asociojn. Ĉu k-do A.B. ne opinas, ke Zamenhof kontente kapjesus, vidante la agadon de la Nederlandaj esperantistoj? Povas esti, ke nun la grundo en Aŭstrio ankoraŭ ne estas favora por fondi pli ol unu asocion, sed oni ne faru ditirambon pri tiu bedaŭrinda situacio, oni nun ĉesu adori tiun nenaturan unuecon. Ni ĝojas, ke k-do A.B. ne intencas pledi, ke S.A.T. likvidu sian fakan organizon kaj ke ĝi kunfandiĝu kun I.E.L. kaj U.E.A. en unuecan organizon. Nu, pri kio do temas? Pri eventualaj komunaj paŝoj por iu celo? Kiu aŭdacas diri, ke la oficiala starpunkto de S.A.T. estas kontraŭ tio? Ĉu la Kopenhaga kongreso de S.A.T. en 1939 ne akceptis rezolucion, kiu havas la jenan tekston: „La Kongreso dezirespr**i**mas, ke la Plenumkomitato en la momento, kiam la tutmondaj E-organizoj konsideras la memonton oportuna sin turni per komuna elpaŝo al la registaroj de la mondo, havu la rajton subteni nome de nia organizo tiun ĉi elpaŝon?“ Ĉu tio signifas, ke S.A.T. ne deziras partopreni en komuna agado? Eble iuj membroj, sed la lasta kongreso esprimis sin aliel. Sed se ni partoprenas, ni certe faros tion nur kiel plenvalora membro, kaj ne kiel iu faka instanco. Tiam ni postulas la samajn rajtojn kiel la neutrala (j) organizo (j).

SAT restas memstara, ĝar ĝi, same kiel la L.E.A.-oj, havas tre gravan mision por plenumi. Ni ne kredas al la fekundeco de tiuj „fermu-vian-buŝon-organizoj“, kaj ni ne kredas, ke la oficialaj instancoj ignoras Esperanton pro tio, ke ekzistas diversaj organizoj. Tio estas sensencaĵo. Cetere ne ĉefe ni meritas riproĉon pro la malharmonio en la E-movado, sed antaŭ ĉio la neŭtrala movado, kiu pro bagatelaj motivoj dividiĝis en du internacioj. Unue do la neŭtralaj organizoj aranĝu siajn aferojn kaj post tio venu kun lojalaj proponoj pri eventuala komuna agado por ia celo.

Ni SAT-anoj alte taksas la valoron de nia lingvo, kiun ni kiom eble plej multe praktikas. Sed ni konscias, ke universala lingvo ne multe signifas, se ne venos en la homaron universala spirito. Tial ni nun jam klopodas kulturi tiun spiriton kaj ĉe tio ni ne timas akuzi la burĝajn morojn kaj ĉiujn ismojn, kiuj laŭ ni kaŭzas la mizeron en la mondo. Ni ne havas apartan respekton por iu, kiu estas esperantisto sen pli; ni ŝatas tiujn, kiuj penadas akiri pli vastan mentalecon pere de la E-movado. Tial nia loko neniam povas esti en la pala, sensanga neŭtrala movado, al kiu ni absolute ne sentas malamikecon. Male, ni ĝojas, aŭdante ĝiajn sukcesojn.

Kaj tiel ni ankaŭ ĝojus, se ni aŭdus pri grandaj sukcesoj en la austria E-movado, sed ni atendas de ĉiu progresema kaj serioza esperantisto en Aŭ-

strio, ke li trovos la vojon al SAT, ankaŭ pro tio, ke SAT jam de multaj jaroj pruvis sian ekzistorajton.“ B. W.

Ni tre ĝojas pri la bontona kaj objektiva polemiko de SAT kaj esperas, ke la diskuto sammaniere estos daŭrigata en la internacia E-movado ĉu neŭtrala aŭ laborista. En Julio-Aŭgusto ĉj. okazos du gravaj Esperanto-kongresoj, UEA-IEL en Bern kaj SAT en Aarhus. Oni devus atendi, ke jam nun estas diskutataj la plej gravaj problemoj kaj programpunktoj de la kongresoj, sed ĝis nun ni nenion aŭdis. Ĉu ne la tutan esperantistaron interesas, kio estu diskutota kaj decidota en la kongresoj?

Ĉar SAT rifuzis la kunlaboron en la kolektado de subskriboj por UNO favore al Esperanto, aranĝita de IEL, tio kredigis nin, ke SAT neniel emas kunlabori kun la t. n. neŭtrala E-movado. Nun ni legis en la respondo de SAT, ke la Kopenhaga Kongreso de SAT en 1939 akceptis rezolucion pri internacia kunlaboro en gravaj aferoj. Tio ja estas ĝojiga komuniko, sed nun temas, ĉi tiun decidon efektive praktikadi por la bono de la tutmovado. Nur tion ni celis atingi per nia artikolo, ne la kunfandiĝon en unueca organizo internacia, sciante, ke tio laŭ la doktrino kaj programo de SAT ne estus farebla.

Sed niaopinie devus esti ebla la fondo de internacia instanco, ekzemple de „Internacia Buroo (Komitato) de la Esperantistaro Tutmonda“ aŭ simile, kiu devus prizorgi kaj aranĝi ĉiujn rilatojn inter la naciaj kaj internaciaj E-organizoj kaj tiamaniere kunigi ĉiujn fortojn kaj sukcesojn pri Esperanto en la mondo. Krome ĝi devus interrilati kiel internacia instanco kun ĉiuj registaroj, internaciaj kongresoj, komercaj ĉambroj, sindikatoj, turismaj burooj, fervojaj kaj ŝipaj administracioj, gazetaro, eldonejoj ktp. kaj konstante proponi al ili la akcepton kaj uzon de Esperanto por iliaj celoj. La Internacia E-Buroo ankaŭ devus aranĝi internaciajn konferencojn pri Esperanto, sugestadi la eldonadon de bonkvalita E-literaturo kaj ĉiurilate akceli kaj apogi la laborojn de la E-Akademio.

Estas ja memkompreneble, ke ankaŭ SAT, al kiu dankas la mondo la multe ŝatatan Plenan Vortaron. kaj kiu organizas en siaj vicoj la plej grandan kaj plej aktivan parton de la laboristaj esperantistoj, nepre devus plenrajte esti reprezentata en tia internacia komitato.

La problemo estas tuŝita kaj nun estas la tasko de ambaŭ movadoj — neŭtrala kaj laborista — kaj de ambaŭ okazontaj kongresoj, en serioza kaj bonvola traktado trovi la plej taŭgan vojon al la solvo.

Sed ni aŭstriaj esperantistoj daŭrigos konservi nian unuecan, supertendencan organizon kaj volas esti amikoj al ambaŭ internaciaj E-movadoj esperegante, ke la vera amo al Esperanto kaj la sincera volo venkigi ĝin, ilin tamen kune kondukos al fruktodona kunlaboro por nia komuna fincelo. Alfred Berdan.

# Rekonstruado en sfero katolika universala

En aŭtuno 1945 la eminenta aŭstria scienculo kaj mondvojaĝinto P. prof. Wilhelm Schmidt, S. V. D., parolis antaŭ streĉe atenta publiko en la salonego de Skota Monaĥejo (Schottenstift) de Vieno pri „Aŭtoritateco kaj Libereco". La profundanima, vasthorizonta oratoro enkonduke konstatis, ke li antaŭ 12 jaroj parolis preskaŭ pri la sama temo: „Libereco kaj Ligiteco de la Kristano." Estis la lasta parolado dum la en Septembro 1933 okazinta Ĝenerala Katolika Kongreso en la granda stadiono. Tuŝante la postajn, precipe spirite premegantajn jarojn sub la barbara novpagana reĝimo, la pastra parolanto montris la neceson de a ŭ t o r i t a t e c o k a j l i b e r e c o: — Jen, la novnaskito havas nur minimumon de libereco, kiu kreskas kaj kresku laŭ kaj kun la maturiĝo. La eternaj rajtoj de la gepatroj, la laŭnaturaj homaj rajtoj, demokrata libereco harmonie ligita kun karaktera respondeco trovis esencan mencion. Li speciale atentigis je la demokrateco en Svislando, kie li dum la tempo de subpremo hejmlanda trovis gastaman ekzilon. Kun insista instigo al publika kunlaboro, malgraŭ mastrumaj zorgoj kaj porhejma familia sento — l a l i b e r e c o e s t a s b o n o, p o r k i e s d e f e n d o n i ĉ i a m e s t u p r e t a j! — finsoniĝis la trafaj, fundaj pritraktoj, vere programa konfeso katolika al libereco kaj oferema kunagado ĉe la novkonstruado de demokrata Aŭstrio.

Schotten-gimnazio en Vieno post la liberigo de Aŭstrio ree funkciigita laŭ sia origina destino, fariĝis ankaŭ la hejmo de „Katolika Akademio". La prelegojn de universitataj profesoroj en fakoj ne nur religiaj, resp. teologiaj, sed ankaŭ ĝenerale kulturaj kaj sciencaj, precipe de filozofio, psikologio, pedagogio, historio, sociologio, literaturo ktp. aŭskultis nombrego de junaj kaj malpli junaj fervoraj gekleremuloj. Ankaŭ eminentaj eksterlandaj scienculoj prelegis kaj parolis en ĝia kadro, i. a. prof. Harcourt el Parizo, pri la fama franca poeto Paul Claudel. La certa risko ĉe la fondo de tia Akademio montriĝis je la fino de la unua prelegjaro pli ol esperite rekompencita per belega sukceso ne nur relativa, sed ankaŭ absoluta. Jen, la kun la historio de Aŭstrio dekomence fruktedone ligita Skota-Abatejo (fondita de duko Heinrich Jasomirgott en 1161) laŭ sia alta tradicio okupas indan lokon kiel spirita provizejo de la katolika kultura celado ankaŭ en nova Aŭstrio. Certe ne hazarde ĝia estro d-ro Peichl estas samtempe varma akcelanto de Esperanto. Dum jaroj li ja ankaŭ donis gastame ejon al la katolika Esperanto-movado de Vieno, resp. de Aŭstrio. Estus speciala tasko, enirigi Esperanton iel ankaŭ en la Akademion.

Granda estis la nombro de atestantoj kaj martiroj el la katolikaro, ankaŭ el la pastraro dum la pasinta tempo de subpremo kaj persekuto.

Kaj la komunaj sufero-travivaĵoj en la arestejoj kaj koncentrejoj efikas plu en la animoj de la suferintoj. La tiea kunesto samsorta kun homoj, nemalofte idealplenaj, altpensantaj, sed diversopiniaj, kun malsamaj mondkonceptoj, alproksimigis homon al homo kaj vastigis horizonton kaj pensaron tute laŭ kristana modelo. Tiel oni ankaŭ nun en la sfero de nova libereco ĝoje konstatas pli malpli reciprokan respektadon kaj komprenemon favorajn al ŝtata rekonstruo sincere demokrata.

Signifa ankaŭ estas la oficiala proklamo eklezia de sindeteno de politiko kaj la koresponda severa malpermeso al la katolika pastraro partopreni en politika vivo favore al des pli energia, celkonscia oferema sindediĉo al la abundaj gravegaj taskoj sur esence religia kaj animprizorga kampoj en nuntempo kaj estonteco. Kompreneble la unuopa katoliko laika (nepastra) laŭ sia konscienco klopodos plenumi siajn devojn rilate al ŝtato kaj ŝtata rekonstruo, kontribuante siajn ĝuste el la kredo venantajn fortojn tiucele por kreo de vere justa socia ordo kaj de sur amo kaj justeco bazita komunuma vivo. Toleremo, komprenemo, kunlaboremo estu gvidaj pensoj ĉe tia praktikado de la religia doktrino! Malaperu ĝenanta kontrasto inter kredo kaj vivo kelkfoje kun bedaŭro sentata!

Kuraĝa komenco estas farita. Certe, ne temas pri facila laboro. Tamen, la tereno estas preparata kaj kulturata. — Antaŭ nelonge d-ro Kleinhappel, S. J., rimarkinde pritraktis la problemon kaj rilaton de Kristanismo kaj Socialismo, montrante samtempe la katolikan socian instruon, el kiu neniam la kapitalista sistemo povas esti argumentata aŭ eĉ defendata; kontraŭe! En „Wiener Kirchenblatt“ (Viena eklezia gazeto) de 17. 7. 1946 estas cito de „Voĉo socialista je la Kristkorpa procesio“. Sekvas preskaŭ kompleta represo de koncerna artikolo de Anton Tesarek (eminentulo en la socialista eduka sektoro) el la monata socialista gazeto por kulturo kaj politiko „Die Zukunft“ (La estonteco). La artikolo kaj ĝia aŭtoro trovas principan konsenton kaj varman taksadon, sekvatan de kun la socialista aŭtoro samsenta esperesprimo, ke en la nova Aŭstrio neniam plu estiĝu batalsinteno de la laboristaro kontraŭ la eklezio. Kaj en la Julio-n-ro de „Zukunft“ enestas pritraktaĵo „Eklezio kaj Socialismo“ de Ernst Mayer, ne ignoranta la malfacilaĵojn en tiu direkto, tamen, laŭ kompetenta katolika konstato, valora kontribuo al interkompreno de eklezio kaj socialismo kaj bela komenco de konfesia paco en la nova Aŭstrio. — Ĉiuokaze sincere klopodas tiucele laborrondo de katolikoj kaj socialistoj, kiel entute la v e r e katolikaj fortoj (t. e. de socia novordigo kaj universala amo ĉe plena respekto de la personeco unuopa kaj tial laŭnature kontraŭfaŝistaj kaj kontraŭkolektivistaj) ĝenerale pliiĝis kaj kreskas plu.

Certe, ĉe tiu rekonstruado katolika universala ankaŭ helpu kaj servu kiel taŭga ilo Esperanto, la lingvo universala. Ĝojigajn informojn tiurilatajn ni ricevis el diversaj landoj kaj modele agadas la oficiala organo de IKUE „Espero Katolika“, bonege redaktata de s-ano L.G. C. De Jong.

Tiel kuniĝu ĉiuj bonvoluloj, volantaj venki malamon detruantan kaj servi al amo konstruanta, amo universala. Signife ĝuste la brita ĉefministro kaj demokrata socialisto Mr. Attlee antaŭ nelonge konfesis: „Nur la reveno al la frateca spirito de la prakristanismo povas savi nian nunan homaron!“

Walter Mudrak, Wien.

# LITERATURO

## Legendoj pri Lenin

21an de Januaro 1947 pasis 23 jaroj, de kiam la fondinto de Sovetio, Vladimir Iljiĉ Lenin, mortis en aĝo de 53 jaroj. Kion Lenin por la popoloj de Sovetio signifis, tion atestas ankaŭ la rakontoj kaj legendoj, kiuj ĉie, eĉ en plej malproksimaj regionoj de la lando, estiĝis pri lia persono. Ĉi tie ni puplikigas malgrandan elekton.

### Lenin fordonis sian animon al malriĉuloj (Tatara mito)

En momento, kiam Lenin estis naskita de la patrino, li ekvidis homan mizeron kaj ĝemis. La tero aŭdis la ĝemon kaj la homoj sciiĝis, ke li, Lenin estis naskita.

Kiam liaj okuloj ekvidis la florantan Urjuk (Tatare: abrikotarbo) por dudeka fojo, li survestis pelerinon, la almozmantelon kaj iris de pordo al pordo. Li iris kaj aŭskultis de pordo al pordo: La mizero de homoj penetris al lia orelo kaj estiĝis malamo kaj amo en lia koro. Li same amis la malriĉulojn tiom, kiom li malamis iliajn malamikojn. Kaj Lenin ekleviĝis por ŝirmi malriĉulojn kaj fordonis al malriĉuloj sian animon. Tiel devas ĉiu agi, kiu volas ŝirmi malriĉulojn. Kiam li ne fordonas la animon, tiam estas la vortoj mensogaj. Kaj Lenin fordonis sian animon. Kaj liaj vortoj estis justaj. Kaj la justeco fruktigis la sekiĝintan arbon.

La koro de Lenin ŝprucigis fajrerojn . . . Ĉi tiuj fajreroj donis pli helan lumon al lignofajro dum nokto. Per sia korsango, per sia amo Lenin antaŭdesegnis al ni la direkton de rekta vojo.

## Lenin, filo de luno kaj de stelo

(Usbeka mito. Skribite en Urgut Usbekistan)

La homoj ne povas vivi sen feliĉo. La homoj serĉas la feliĉon, ili sentas, kie ĝi povas troviĝi kaj kontraŭiras ĝin. Sed la vojo al feliĉo kondukas trans malvarmaj neĝmontoj. Tio estus ne tiel malbona, se la vojo al feliĉo ne estus barita per Ok-Ilen, la sago-serpento. Ĉiuj malbonaj fortuloj ordonis al Ok-Ilen: „Ne lasu trapasi ilin!“ Kaj ĝi ne lasas trapasi ilin. Sed la homoj ne povas vivi sen feliĉo. Kaj ili inventis sagon kaj arkon. Do armite ili elmarŝis por serĉi la feliĉon. Sensukcese, la sagoj ne povis vundi Ok-Ilen; ili disrompiĝis ĉe ĝi. La homoj eltrovis ŝildon. Sirmite de ŝildoj ili ekvojaĝis sur vojo al feliĉo. Sed ĉi-foje traboris Ok-Ilen la ŝildojn kaj fluis multe da homsango. En sia malespero la homoj ĉiam inventis novajn armilojn, kaj gento post gento, popolo post popolo batalis por la feliĉo. Ĉar homoj ne povas vivi sen feliĉo. Sed kiel antaŭe Ok-Ilen neniun lasis trapasi. Ok-Ilen kreskis; ĉiu nova invento de homoj nur ankoraŭ pli fortigis ĝin.

La homoj ne plu sciis, kion fari, ili jam estis pretaj, resti starantaj sur duona vojo. Jen venis homo. Li estis simpla, vestita kiel Deĥkanin, li havis kalojn sur mano, estis manoj de Deĥkanin, kaj en manoj li portis panon. La homo eĉ ne posedis armilon; li nur havis panon. Per la pano en la mano li marŝis kontraŭOk-Ilen. La homo proksimiĝis al Ok-Ilen kaj Ok-Ilen proksimiĝis al la homo, kaj ili restis starantaj unu antaŭ alia. Ok-Ilen kolektis siajn fortojn kaj ĵetis sin sur la homon. La homo ne defendis sin; li prezentis al la serpento siajn kalajn monojn, kiuj tenis la panon. Ok-Ilen tuŝis la panon. Ok-Ilen disbatis sin ĉe la pano kaj mortfalis. La vojo al la feliĉo estis libera kaj homo post homo surpaŝis la vojon al feliĉo.

La homo, kiu kondukis ilin kaj liberigis ilin de Ok-Ilen, estis malriĉa, sed li estis la filo de luno kaj de stelo kaj de ili li heredis la forton.

Aŭskultu, aŭskultu, vi Usbekoj; ĉi tiun homliberiginton oni nomas Lenin . . .

## La plej supera — la granda Iljiĉ

(Ĉutĉi-legendo. Skribite laŭ rakonto de Korjaka-ĉasisto sur Ĉukoĉen-Kabo, plej ekstera loko de nord-okcident-Siberio)

Tio estas bona, tio estas tre bona. La homoj ne plu tiel malsatos kiel pli frue; pli frue, kiam la nunaj ĉasistoj ankoraŭ estis junuloj kaj ankoraŭ ne trovis siajn edzinojn.

Foje estis malbona jaro. Besto ne estis ĉasebla. La homoj malsatis. Ili pretigis sin al longa lasta vojo tra granda nebula Tundra. Multaj

foriris . . . por ĉiam. Oni nenien povis veturi. Ĉi tie por la hundoj ne estis furaĝo. Pulvo ankaŭ ne estis havebla.

La nigra demono decidis, ekstermi nian popolon. Ĝi forpelis la bestojn. Ĝi influis komercistojn, nenion plu doni al ni. Ĝi kaŝiris ĉirkau niaj hejmoj kaj rigardis, kiel ni mortis. Jen, la maljuna ĉasisto Sagiĉig decidis batali kun ĝi. Li preĝis dum tuta nokto. Matene li prenis la intestojn de lasta bučita hundo. Kaj foriris. Tri tagojn pli malfrue foriris tiuj, kuj ankoraŭ povis bone iri, alfiksis la skiojn por serĉi lin. Ili trovis lin. Li kuŝis malantaŭ la hela monto, apud li, en kaptilo, sidis la nigra demono kaj batis ĉirkaŭ si. Ni mortigis ĝin. Por ĝia felo ni ricevis multe da faruno, teo, pulvo kaj kartoĉoj. Tio estis jam delonge. Nun tia ne plu povas okazi. Malproksime de ni, tie, kie oni alvenigas al ni teon, ekzistas multaj bonaj homoj . . . Ili ne timas la nigran demonon. Iliaj superuloj estas severaj, sed ili observas tion, ke ĉio bone fartas. Ilia plej supera ĉefo estas Iljiĉ. Li estas granda, granda, ankoraŭ pli granda ol tiu hela monto, malantaŭ kiu oni trovis la nigran demonon: Iljiĉ instruis la homojn esti bonaj. Li rakontis al ili, en kio konsistas la justeco. Li ordonis al ili, esti justa kun ni. Iljiĉ nun ne plu estas tie: li ankaŭ foriĝis al la granda, nebula Tundro. Sed ankaŭ de tie li parolas al siaj geviroj kaj ili aŭskultas lin. La maljuna Vork, kiu en lasta vintro por ĉiam iris en Tundron, vidis en sonĝo Iljiĉon. Li estis grandega kaj forta, havis seriozan vizaĝon kaj parolis afable al Vork: „Diru al via popolo, ke ĝi ĝoju kaj havu paciencon. Mi pensas pri vi. Vi ne plu devos malsati, kaj la nigra demono ne plu kuraĝos ofendi la popolon. Baldaŭ ekleviĝos la suno, ĝi lumos grande kaj hele por vi ĉiam. Ne plu estos krepusko, ne plu longa nokto, neniam Purga (neĝventego), neniam glacia vintro.“ Tiel parolis Iljiĉ, poste li ridetis kaj forpaŝis trans la Tundro.

Kiam Vork rakontis sian sonĝon, li ploris kiel virino. Sed kiam li mem por ĉiam devis iri en grandan Tundron, li ĝojiĝis kaj diris al ĉiuj, ke li nun renkontos Iljiĉ-on. Li restos ĉe li, ĉiam ekbruligi fajron, por lumigi lian vojon kaj kovri lin per molaj feloj.

Tradukis Feilbacher

El „Stimme der Frau“, n-ro 4/47.

★

Esp.-verkisto — iama Geŝtapo-arestito — serĉas vortaron (Christ. aŭ Bennemann). W. Steinhauer, Wien XVI, Wilhelminenstraße 67.

# La paperujo de mia praavo

de Adalbert Stifter, el Studien 1841—1843

Io kortuŝa estas en tiuj ĉi senparolaj, neklaraj rakontantoj de la nekonata historio de tia domo. Kia veo kaj kia ĝojo ja estas kaj restas en la tombo de tiu nelegata historio! La blondbukla infano kaj la ĵus naskita muŝo, kiu apude ludas en la oro de la suno, estas la lastaj membroj de longa, nekonata ĉeno, sed ankaŭ la unuaj de eble pli longa, pli nekonata; kaj tamen ĉi tiu vico estas vico de parenceco kaj amo, kaj kiel solece la unuopulo staras ĉe la mezo de tiu vico! Do, kiam dekoloriĝanta bildo, ruinaĵo, sablereto rakontas al li pri ili, kiuj estis antaŭ li, tiam li estas multe malpli sola. Kaj kiel sensignifa tiu ĉi historio estas; ĝi atingis nur ĝis la avo aŭ praavo kaj ofte nenion rakontas krom pri baptoj de infanoj, edziĝoj, entombigoj, dotoj al posteuloj — sed kia neelpensebla multo da amo kaj doloro estas en tiu ĉi sensignifo. Ankaŭ en la alia, granda historio ne povas esti pli multe; jes, ĝi estas ja nur la senkolorigita kunaĵo de tiuj malgrandaj, en kiu oni forgesis la amon kaj priskribis la sangverŝadon. Sed la granda, ora riverego de l'amo, kiu dum la jarmiloj fluadis ĝis ni, tra la nenombreblaj koroj de patrinoj, tra fianĉinoj, patroj, gefratoj, amikoj, estas la regulo, kaj ĝia registrado forgesiĝis; la alia, la malamo, estas la escepto kaj estas skribita en miloj da libroj.

Elgermanigis Dr. Adolf Halbedl.

# Funebra parolado de Grillparzer ce la tombo de Beethoven (29. 3. 1827)

Antaŭ 75 jaroj mortis Grillparzer; antaŭ 120 jaroj mortis Beethoven. La parolado de Grillparzer ĉe la tombo de Beethoven apartenas al la plej belaj verkoj de la germanlingva proza literaturo.

Starante ĉi-tie ĉe la tombo de tiu mortinto, ni estas kvazaŭ la reprezentantoj de tuta nacio, de la granda germana popolo[1]), funebranta pri la foriĝo de la unu glorigita duono de tio, kio restis al ni de l' pasinta brilo de hejma arto, de patriota spiritprospero. Vere vivas ankoraŭ — kaj longe li vivu! — la heroo de l' kantado[2]) en germana lingvo kaj esprimo; sed la lasta majstro de l' sono, la dolĉa buŝo de l' muziko. la heredinto kaj pligrandiginto de la senmorta gloro de

[1]) Tiam Aŭstri-Hungarujo apartenis ankoraŭ al la Germana ŝtatligo.
[2]) Schubert.

Händel kaj Bach, de Haydn kaj Mozart, li atingis la finon de sia vivo, kaj ni staras plorante apud la ŝiritaj kordoj de la forsoninta ludo.

De la ludo forsoninta! Lasu min tiel lin nomi! Ĉar artisto li estis, kaj kio li estis, li estis ĝi per la arto. La pikiloj de l' vivo lin vundis profunde, kaj kiel la ŝiprompiĝulo alkroĉiĝas al la bordo, tiel li rifuĝis en vian brakon, ho vi belega fratino same de l' bono kaj vero, vi konsolanta la suferojn, vi de l' ĉielo veninta arto. Firme li fidis al vi, kaj eĉ kiam la pordeto estis fermita, per kiu vi estis enirinta lin kaj alparoladis lin, kiam li fariĝis blinda por viaj trajtoj per sia surda orelo, li daŭris porti vian bildon en la koro, kaj kiam li mortis, ĝi kuŝis ankoraŭ sur lia brusto.

Heroo de l' arto li estis, kaj kiu similus lin?

Kiel Behemoto [3]) furiozas tra la maroj, tiel li travervis la limojn de sia arto. Ek de la kverado de l' kolombo ĝis la muĝado de l' tondro, de la plej artifika interplektiĝo de obstinaj propraj artesprimiloj ĝis la terura fazo, en kiu la home formita transiras en la senregulan arbitrecon de interbatalantaj naturfortegoj, ĉion li trakuregis, ĉion li elkaptis. Kiu venos post li, tiu ne povos daŭrigi, sed li devos rekomenci, ĉar lia antaŭirinto ĉesis nur tie, kie la arto ĉesas.

Adelaide kaj Leonore! [4]) Soleno de l' herooj de Vittoria kaj humila kanto de l' mesofero! Idoj vi de la tri- kaj kvaropigitaj voĉoj! Muĝanta simfonio „Ĝojo, bela difajrero!", vi kanto de l'cigno! Muzo de l' kanto kaj de l' kordoludo: starigu vin rode ĉirkau lia tombo kaj sternu laŭrojn sur ĝin!

Artisto li estis, sed ankaŭ homo, homo en ĉia, en la plej alta senco. Ĉar li apartigis sin de la mondo, ili nomis lin malamikema, kaj ĉar li evitis sentimentojn, ili nomis lin sensenta. Homo, kiu sin scias hardita, tiu ne fuĝas! Estas la plej delikataj pintoj, kiuj plej facile malakriĝas kaj fleksiĝas aŭ rompiĝas. La troo da sentemo elturnas sin for de la sentemo! Li fuĝis la mondon, ĉar en la tuta regiono de sia amanta animo li ne trovis armilon por kontraŭbatali ĝin. Li foriris de la homoj, doninte al ili ĉion kaj ricevinte por ĝi nenion. Li restis sola, ĉar li ne trovis duan mion. Sed ĝis sia morto li konservis koran kompatemon al ĉiuj homoj, patran senton por la siaj, kaj la plenan vivon por la tuta mondo.

Tia li estis, tia li mortis, kaj tia li vivos por ĉiuj tempoj.

Sed vi, kiuj sekvis nian akompanon ĝis tie ĉi, vi regu vian doloron! Vi ja ne perdis lin, sed gajnis por ĉiam. Neniu vivanto eniras la halojn de la senmorteco. La korpo devas perei, nur tiam ĝiaj enirejoj malfermiĝas. Tiu pri kiu vi funebras, li staras de nun inter la plejgranduloj de ĉiuj tempoj, netuŝebla por ĉiam. Tial reiru hejmen,

---

[3]) Laŭlegenda marmonstro.
[4]) Figuroj el verkoj de Beethoven.

ĉagrenitaj, sed trankvilaj! Kaj se iam en via vivo la potenco de liaj kreaĵoj kiel venanta ventego venkos vin, kiam via raviteco fluos en la mezo de generacio nun ankoraŭ ne naskita, tiam rememoru tiun ĉi horon kaj pensu: Ni ĉeestis, kiam li estis entombigata, kaj ni ploris pri lia morto.

Trad. E. Pebe.

# Cu vi estas libroamiko?

De Stephan Zodel

Vi jesas mian demandon, kompreneble. Mi ne atendas ion alian. Permesu do, nia kara, ke mi faru al vi proponon, proponon, kiu ŝajnas al mi valora, imitinda.

Depost jaroj mi uzas kajeron, en kiu mi notas ĉiujn librojn de mi legitajn. Mi praktikas tion en jena maniero: Aŭtoro. — Titolo kaj subtitolo de la libro. — Eldonejo.

Nun sekvas kelkaj koncizaj frazoj pri tio, kion donis al mi la supre citita libro. Povas esti ankaŭ ekstrakto aŭ karakterizaj frazoj el la koncerna verko. Dato.

Mi faris bonajn spertojn per tiuj ĉi notoj. Unue estas fiksitaj la legitaj libroj, due ekestiĝas pli intima rilato al libro, se oni ĝin pritraktas laŭ la menciita maniero, trie okaza tralegado de la kajero revivigas verkojn, kiuj iam okupis nian spiriton kaj plenumis nian animon, kvare per la memoro pri la libroj ni ree kaj ree esprimas nian dankon al la poetoj aŭ verkistoj, kiuj riĉigis nin, kvine ni havas ian kontrolon kaj superrigardon pri la literaturo, en kiun ni enpenetras.

Mia kajero, fariĝinta por mi multvalora trezoro kaj kara posedaĵo, portas la surskribon: „Fontoj de l' spirito". Mi konfesas: mi ne plu povas malhavi tiun ĉi kajeron.

Jen iniciato por eventuala imitado.

# Granda burleskulo havas zorgojn

De Breslauer

Gajigistoj en sia privata vivo plej ofte estas la malo de tio, kio ili ŝajnas esti sur la scenejo aŭ en la maneĝo. Se kurbiĝas la publiko pro ridado, kiam komikisto depafas spritaĵon aŭ burleskulo faras ekstravagancajn ŝerojn, la gajigisto ja ĝojas pri ĉi tiuj bonsignoj de la sukceso, sed post la prezentado nek ekzistas kaŭzo por ridi pri li, nek li mem ridas pri sia sorto, kiu lin faris tielnomata ridmuskoldresisto. Ili ne ŝprucas de si mem, la fontoj de la bona humoro, kaj ĉiu ridsukceso estas frukto de streĉa meditado, atentema observado kaj kelkfoje ankaŭ de la fulmrapida ekkono de la situacio.

Kaj pro tio ankaŭ sinjoro Ŝneŭcler, — lia artista nomo estis Pip-Pop kaj la publiko kvazaŭ ruliĝis pro plezuro, kiam li laboris en la cirkuso Enigmareli — dum iu tago sidis en sia zorgseĝo kaj meditegis, kiamaniere lia rolo povus esti refreŝigota, ĉar lasttempe la ĉiuvespera sukceso, al kiu li jam kutimiĝis, ŝajnis treege malgrandiĝi.

„Jen, la virinoj fartas pli bone, diris sinjoro Ŝneŭcler al si, ĉi tiuj dumtage centfoje beligas sin per lipruĝigilo kaj pudro. Bona Dio, kiel ridkanono oni havas malfacilan vivon."

„Oni sidas, turmentas la kapon pro stultega ŝerco, kiu post duona minuto ekpasas kaj aspektas kiel improvizaĵo kaj . . . haltu, mi havas! . . . Mi prenas . . ." Tiumomente la pli bona duono de sinjoro Ŝneŭcler eniris la ĉambron kaj vokis: „Franĉjo — ĉu la ĉapeleto ne estas ĉarma?" „Sankta Dio!" sinjoro Ŝneŭcler furiozigite ekleviĝis, „ĝuste nun vi devas ĝeni min? Mi havis ideon, — inspiron — kaj nun ĝi estas for!"

„Sed la ĉapeleton, Franĉjo, ĵus mi aĉetis ĝin por mi!"

„Mi malbenetas la ĉapeleton kiu min ŝiris el mia bonhumoro! Kio tio estu? Ĉapelo? Cetere, tiajn ĉapelojn, kiujn la virinoj en la nunaj tagoj gluas sur la kapon! Aŭ tiu ĉi ĉapeleto aspektas kiel pinta papersako farita de netalenta butiklernanto, aŭ kiel malbone farita burleskul-cilindro kun tro larĝigita rando. Kaj tio estas gluita sur la frunto kaj povas ĉiumomente degliti! Ridindaj kovriloj ili estas — kaj ne ĉapeloj!"

„Kaj kion vi aĉetis, estas pli terura! Elgo! Tion mi diras al vi, se vi surmetus tion, mi ne irus kun vi sur la straton! Pri mi ja devus ridi eĉ la bovoj!"

„Nun", diris la edzino Elgo incitite „ĝoju, ke tiuj ĉi ridas pri vi! En la cirkuso lasttempe eĉ ne hundo ridis pri vi!"

„Tion mi kredas", grumblis la edzo „ĉar vi ĉiam malhelpas pensi pri mia profesio! Ĉiam mi nur pensu pri viaj ĉapeloj kaj vestaĵoj . . . Mi nun volas havi trankvilon!"

„Hu!", diris sinjorino Elgo kun mokanta riverenco: „Hodiaŭ li ree estas komika, la granda burleskulo . . . Sed mi jam iras for . . . Adiaŭ!"

Kaj sinjorino Elgo lasis sola sian grumblantan edzon kun liaj zorgoj . . . Ankoraŭ en la sama vespero la burleskulo Pip-Pop post la prezentaĵo bonhumore velveturis al la hejma haveno.

„Elgo!" li okulridis. „Tio hodiaŭ estis sukceso! La homoj ridegis, ke kurbiĝis la benkoj! Tian sukceson mi jam ne havis depost kelkaj semajnoj!" „Tio treege ĝojigas min!" diris sinjorino Elgo, kontenta, vidi la edzon en bona humoro. „Ĉu vi faris novajn ŝercojn?"

„Jes, tion mi povas aserti!" Sinjoro Ŝneŭcler ridis, kiel li nur malofte ridis. „Kaj kian ŝercon! Ĉu vi scias kion mi faris? . . .

Mi nur surmetis la ĉapeleton aĉetitan de vi posttagmeze!"

Tradukis Loibel G.

# La noktgardisto kaj la dentaro

De A. Peter

Kiam en la aŭtuna tempo, en la urbeto Winkelkram, la noktgardisto devis elvoki la horojn, ĉiam pli oni plendis pri tio, ke la nokthoranoncoj de la noktgardisto ĉiutage — pli bone dirite, ĉiunokte — pli kaj pli iĝis nekompreneblaj.

La urbestro pro tio opiniis, ke estas necese venigi al si la noktgardiston Peddersen.

Li diris: „Vi estas nun dum tridek jaroj en nia urbeto okupata kiel lampopurigisto kaj noktgardisto, kaj neniam aŭdiĝis pri vi plendoj. Sed en la lasta tempo oni multfoje plendas, ke oni ne povas kompreni viajn elvokojn de la horoj. Pri la vereco de tiuj plendoj mi konvinkis min mem kaj nun mi volas scii la kaŭzon de vi."

„Tio povas esti eble pro tio, sinjoro urbestro", diris la maljuna Peddersen, „ke mi perdis iom post iom ĉiujn miajn dentojn."

„Kial vi ne farigas al vi artefaritajn dentojn kiel mi?" daŭrigis demandi la urbestro.

„Por tio al mi mankas la mono pro mia malgranda salajro."

„Tiam mi volas provi, ĉu la komunumo permesas elspezi la monon por tiu celo."

Tuj estis kunvokita eksterordinara komunuma kunveno por interkonsiliĝi, ĉu al la noktgardisto Pedderson estu rekompencataj la elspezoj por rebonigo de sia elparolado per nova dentaro.

Vigla debato estis en tiu kunsido kaj multaj parolantoj estis kontraŭ la permeso. La urbskabeno Riĥter motivigis la rifuzon per tio, ke lia edzino ankaŭ ne havas dentojn kaj tamen ŝi pli parolas ol li ŝatas. Ankaŭ skabeno Kraŭse diris, ke lia artefarita dentaro kuŝas en la tirkesto kaj liaj infanoj tiun uzas por nuksmalfermado, sed li tamen povas paroli. Malgraŭ tiuj konvinkaj argumentoj estis permesataj la elspezoj por akiro de la dentaro por la noktgardisto Peddersen post trifoja traktado kun iomete da plimulto.

Nun la noktgardisto havis la dentaron jam kelkan tempon, sed tamen ne estis ŝanĝo en la malklareco de liaj elvokoj.

Jam venis ree plendantoj, kiujn la urbestro per tio silentigis, ke en la komenco la elparolado plej ofte ne estas klara, ankaŭ ĉe li estis same, sed post kelka tempo tio ŝanĝiĝos.

Tamen post pluraj semajnoj la malbonstato ne forestis. La urbestro denove venigis la noktgardiston kaj demandis lin pri la nova dentaro.

„Do, ĉu vi ĉiurilate estas kontenta pri la dentaro, sinjoro Pedderson?"

„Tute, sinjoro urbestro, mi ne povas plendi pri io.“

„Ĉu estas tiel? Sed, mi ne povas kompreni, kial viaj elvokoj de la horoj tamen ĉiam estas ne klaraj, ĉu vi povas klarigi tion al mi?“

„Certe, sinjoro urbestro, tio estas pro tio, ĉar mi nokte ne povas uzi la dentaron.“

„Sed, kial ne?“

„Ĉar la dentkuracisto diris al mi, ke ĉiam dum la nokto mi metu la dentaron en glason kun akvo.“

Esperantigis Mina Schober.

# Dommastrinaj zorgoj

## Kvin nacioj — kvin opinioj

La usona Galupp-instituto aranĝis antaŭ ne longe enketon inter dommastrinoj de kvin nacioj por ekscii, kion la dommastrinoj nuntempe taksas kiel la plej nenecesan kaj kion kiel la plej necesan dommastrum-objekton.

La rezulto de tiu ĉi interesa pridemando estis jena:

La Nov-Jorkanino: La plej nenecesaĵo — la ŝtopligno; la plej necesaĵo — la konservmalfermilo.

La Londonanino: La plej nenecesaĵo — la sunŝirmokulvitroj; la plej necesaĵo — la pluvombrelo.

La Parizanino: La plej nenecesaĵo — la bierservico; la plej necesaĵo — la tualettablo.

La Moskvanino: La plej nenecesaĵo — la kunloĝanto; la plej necesaĵo — la radioaparato.

La Vienanino: La plej nenecesaĵo — la graspoto; la plej necesaĵo — la dorsosako.

Eduard Franz

# Virino — sinjorino — edzino

Se oni edziĝas pro amo, oni fariĝas viro kaj virino, se oni edziĝas pro komforteco, oni fariĝas sinjoro kaj sinjorino kaj kiu edziĝas „pro cirkonstancoj“ fariĝas edzo kaj edzino.

La malsanan viron flegas la virino, vizitas la sinjorino kaj pri lia farto informas sin la edzino.

Je niaj zorgoj partoprenas la virino, la monon prenas la sinjorino kaj ŝuldojn faras la edzino.

Se ni mortis, priploras nin la virino, priplendas nin la sinjorino kaj vestas sin per funebraj vestoj la edzino.

Esperantigita de Gustav Schmid

★

# *LA ESPERANTO-MOVADO EN AUSTRIO*

## AUSTRIA REGISTARO INVITAS ESPERANTO-MONDKONFERENCON.

Okaze de aŭdienco ĉe la trafikministro Vinzenz Übeleis reprezentantoj de la aŭstria E-movado priparolis inter alie eventualan okazigon de Mondkonferenco pri Esperanto en Vieno.

La ministro poste raportis en la ministrar-kunsido la 11. II. 1947 pri ĉi tiu afero kaj la ministraro unuanime decidis, ke la aŭstriaj reprezentantoj en la Universala Kongreso de Esperanto en Bern transdonu la oficialan inviton de la aŭstria registaro pri okazigo de Esperanto-Mondkonferenco en Vieno 1948.

Tiutempe ankoraŭ ne estis sciate, ke dume Franca Esperanto-Unuiĝo kunvokis Esperanto-Mondkonferencon 1948 al Parizo. Tiun Komunikon ni nur poste eksciis per alveno de „Heroldo“ numero 3/1947.

Verŝajne pro tiu kaŭzo la invito de la aŭstria registaro ne estos realigebla, sed tamen ĝi pruvas la oficialan akcelon de Esperanto en Aŭstrio per la plej alta registara instanco.

## Generala direktoro de la Aŭstria ŝtata poŝt- kaj telegrafa administracio por Esperanto.

D-ro Karl Dworschak, la ĝen. dir. de la Aŭstria ŝtata poŝt- kaj telegrafa administracio deklaris sin por Esperanto. Li nun mem studas la lingvon, aliĝis al AEF kaj estis eknomita de AEF prezidanto de la komitato en AEF por eksterlandaj aferoj.

Gen.dir. d-ro Karl Dworschak jam ekprenis la korespondadon kun diversaj eksterlandaj instancoj. Li verŝajne ankaŭ gvidos la aŭstrian esperantistan delegacion al U. K. de Esperanto en Bern.

Estas bona aŭspicio por la U. K., ke la svisa ministro de la poŝta departemento, d-ro E. Celio, prezidos la kongreson kaj alia (aŭstria) altranga poŝta aŭtoritatulo transprenos ĝin. Se venus ankoraŭ alilandaj reprezentantoj de ŝtataj poŝtaj administracioj, ili povus en faka kunsido diskuti la ebloin por akceli Esperanton en la poŝtaj sferoj.

## Lektorato pri Esperanto en la Altlernejo por Agrikulturo

Nia tre agema kunlaboranto prof. d-ro J. E. Görlich, jam vaste konata pro siaj propagandartikoloj priesperantaj en diversaj gazetoj kaj revuoj en- kaj eksterlande, estas nomita de la instruministrejo lektoro pri Esperanto en la Altlernejo por Agrikulturo en Vieno.

## Esperanto en la Popola altlernejo Wien XVI — „Volksheim“

Ni ĝojas povi komuniki, ke ĉi tiu vaste konata popola altlernejo denove akceptis Esperanton en sia programo. Kurso komenciĝis la 3. III. 1947.

## Esperanto en la Popola altlernejo Wien — Simmering

La 7. III. 1947 komenciĝis en la nomita kleriga instituto komenca E-kurso, gvidata de la Radio-instruisto direktoro Strobl.

## Aŭstria Esperanto-movado respeguliĝis en „Heroldo“

Heroldo de Esperanto publikigis en numero 4/1947 ampleksajn artikolojn pri la Esperanto-movado en Aŭstrio. Ni dankas al Heroldo, ke ĝi per tio konigis al la esperantistaro en tutmondo la aktivan agadon de la aŭstriaj samcelanoj por nia komuna celo, ĉar la artikoloj elmontris, ke la aŭstriaj esperantistoj ĝenerale ne deflankiĝis de la alta ideo Esperanta malgraŭ la sepjara perforta reĝimo nacisocialisma.

## Agrikulturistoj, ĝardenistoj, kulturistoj de fruktarboj

kaj vinberoj, arboflegistoj, ceteraj fakuloj koncerne la batalon kontraŭ la

malutilaj insektoj, de arvikoloj, terlaboristoj, dombest-bredistoj atentu!

Aliĝu kaj kunlaboru en la agrikultura fakmovado internacia, kiu jam aktivigis en Francujo, Nederlando, Britujo, Ĉehoslovakujo, Kanado, Finlando, Novzelando, Brazilio. Gia celo estas kunigo de ĉiuj esperantistoj iel rilatantaj al la agrikulturo, kompilo kaj verkado de agrikultura terminaro, interŝanĝo de ĉiaj sciindaĵoj, eltrovoj kaj informoj kaj fine aperigo de propra fakrevuo. La provizora fakestro por Aŭstrio estas: Josef Eder, Bezirksbaumwärter, Stattegg — Eichberg 72, Post Graz-St. Veit, Steiermark.

**Naturamikoj, atentu!**

Por ke ni enkonduku Esperanton kiel interkomprenigilon en la turista unuiĝo „Naturfreunde", ĉiuj membroj esperantistaj kunigu siajn fortojn kaj ni faru la movadon turistan vere internacia per enpenetrigo de Esperanto. Eble ni fondu Esperanto-sekcion kun la centro en Wien. Bonvolu anonci vin provizore ĉe Josef Eder, Stattegg-Eichberg 72, Post Graz-St. Veit, Steiermark. (Ne forgesu reafrankon!)

**Fervojista fakgrupo esp-ista**

La fakgrupo elektis por ĉiu federacia lando delegiton. Ĉiu fervojista esperantisto en la federaciaj landoj estas petata, sciigi al sialanda delegito sian adreson, menciante, ĉu troviĝas en lia loĝloko E-grupo de Aŭstria Esperantista Federacio — AEF kaj ĉu li jam estas ties membro. Se jes, tiam li aliĝu al la fervojista fakgrupo kiel subtenanta membro kaj pagu monate 50 g, ricevonte apartan membrokarton, per kiu li estas samrajta membro kiel la aktiva. La fakgrupa kaj honora kotizoj, la lasta kun cito de membronumero de AEF, kiel ĉiuj ceteraj priesperantaj aferoj, estu direktotaj al jenaj delegitoj:

**Tirol:** Alois Hilkersberger, Landeck, Haus „Espero", Lötzweg 1.

**Salzburg:** Johann Huber, Salzburg, Rottmayergasse 27.

**Oberösterreich:** Joh. Sighartner, Linz, Frankstraße 57, Stiege 2.

**Niederösterreich:** Rudolf Ulreich, Staciestro en Horn.

**Kärnten:** Alois Ramschak, Villach, Marksgasse 13.

La fervojistaj esperantistoj en Linz kunvenas ĉiuvendrede je la 19-a h. en Linz, Bahnhofstraße, U-Bau, vid-al-vide de stacia enirejo.

La fakgrupa estraro sendis petskribon al la ĝenerala sekretariejo de la aŭstriaj ŝtatfervojoj, por ke estu permesate fiksi Esperanto-varbafiŝojn en ĉiuj stacioj, deĵorejoj ktp. Krome la grupo petis, ke estu agnoskata Esperanto samvalora kun aliaj lingvoj kaj la Esperanton parolantaj fervojistoj estu en la lingvo deĵore ekzamenitaj kaj poste al ili permesita la portado de la E-insigno ankaŭ dum la deĵoro.

La sindikata fakorgano „Der Eisenbahner" (La fervojisto) publikigis en numero 1/1947 artikoleton favore al Esperanto.

**La evoluo de teleraporta strukturo post la mondmilito**

estos la temo de parolado farota de s-ano inĝ. Frischauf la 10. 6. 1947 en la kadro de la grupvespero de fervojista fakgrupo je la 18 a h. en Wien I., Neutorgasse 9.

**Tramistaj esperantistoj, ni vokas vin!**

Ni volas restarigi la iaman E-fakgrupon de la tramistoj, por ke ĝi denove transprenu la propagandon de Esperanto inter sia kolegaro. Anoncu vin do plej baldaŭ pro aktiva kunlaboro persone aŭ letere en la sekretariejo de AEF, Wien I, Neutorgasse 9.

**Filatelistoj atentu!**

Per Esperanto vi havas eblecon, ne nur kun ĉiuj eŭropaj landoj, sed ankaŭ kun la plej malproksimaj kaj plej malgrandaj landoj ricevi tutmondan rektan kontakton. Do sekve de tio vi povas akiri poŝtmarkojn el ĉiuj landoj. Interesiĝantoj sin turnu al la AEF-centro, Wien I, Neutorgasse 9 por fondi filatelistan grupon aŭ skribu al la ĉefdelegito por Aŭstrio: Johann Janecka, Wien XIX, Diemgasse 3, 3/14.

**Esperantistaj akademianoj anoncu vin!**

Estas intencite fondi en la kadro de AEF fakgrupon de esperantistaj akademianoj. Kiu el vi pretas aktive partopreni kaj kunlabori bonvolu sendi sian adreson al la sekretariejo de AEF, Wien I, Neutorgasse 9.

**E-grupo „Supren"**

Vieno III., kunvenas depost la 8. 5. 1947 en kafejo „Exzelsior", III., Landstraße Hauptstraße, ĉiun 2-an ĵaŭdon en la monato. Gastoj estas bonvenaj.

**Esperanto-Societo „Danubio"**

La ĉi-jara ĝeneral-kunveno okazis la 23-an de Februaro en la societejo, gastejo Zboril, Vieno VII., Sigmundgasse 14. La raportoj montris, ke la societo en la jaro 1946 a spite la multaj malfavoraj kondiĉoj forte progresis. La anaro duobliĝis (51), en sama grado pli ampleksiĝis la grupa biblioteko, enhavanta nun 485 volumoj de klasika kaj aktuala Esp.-literaŭturo. Depost Majo okazos la grupaj kunvenoj ĉiun duan kaj kvaran lundon de la monato en la supre menciita societejo je 18.30 vesp. Gastoj estas ĉiam elkore bonvenigataj. Por la anoj kaj gastoj estas eldonata monata bulteno. Libro-servo ebligas al la membroj akiri Esperantaĵojn kaj Esp.-librojn.

**E-grupo „Konkordo"**

Vieno X., Wielandgasse 16, kunvenos ek de 8 a de Aprilo ĉiun mardon je la 18.30—20.30 a horo.

**Grupo „Harmonio" Wien XV.**

En la jarkunveno okazinta la 14an de Marto 1947 la estraro de la grupo estis novelektita. Estro ree fariĝis s-ano Vokal Emil. La raportoj montris kontentigan evoluon koncerne la membronombron kaj financojn. Pasintjare estis 55 membroj en la grupo (1945 nur 30). Meznombre 29 s-anoj vizitis la ĉiusemajne okazintajn grupkunvenojn, malgraŭ ke mankis dum la severa vintro hejtmaterialo kaj manĝaĵoj.

5 membroj el la grupo kun distingo faris la ŝtatan ekzamenon pri scio de Esperanto kaj parolkapableco. Du kursoj por komencantoj kaj du por progresantoj estis aranĝitaj. Tri gajigaj aranĝoj okazis, unu el ili, la Krampusa festo estis vizitata de 110 ges-anoj.

**„Laboro", Fakgrupo de Volksbildungshaus Währing, Vieno XVIII., Schopenhauerstraße 49:**

Raporto Marta: Ni konstituis nin en popolaltlernejo Währing kiel fakgrupo kaj opinias, ke ni tiel ekhavis bonan bazon por kursgvidado en aŭtuno kaj ke ni povos uzi la propagandon de tiu instituto. La partoprenantoj plimultiĝas pro la cedo de la vintraj malhelpaĵoj. Nia biblioteko nun entenas 121 volumojn kaj broŝurojn. Abonitaj por la klubo: Heroldo de Esperanto, Weltsprache, Internacia Kulturo, Sennaciulo kaj Literatura Mondo. La grupo aliĝis kiel akcelanto al „Aŭstria Societo de la Amikoj de E."

Kunvenoj: ĵaŭdes, 19—21 h.

**Malgraŭ malhelpoj**

Post dumonata paŭzo, kiun kaŭzis la manko de hejtmaterialo, la gekursanoj de la kurso por komencantoj en Popolkleriga Instituto Alsergrund kunvenis por fini la kurson per aparta aranĝo. Nia fervorega propagandisto, s-ano Ullrich, de la grupo Koloman Kalocsay kunvokis nin tie por tiu celo, kiam li estis sukcesinta certigi al ni hejtitan ĉambron.

Kursgv. Hugo Kraus unue raportis pri la kurso mem kaj sciigis kelkajn statistikajn detalojn. La kurso havis 50 membrojn, de kiuj 35—38 regule frekventis la lecionojn. La aĝa diferenco inter la plej juna, 9-jara partoprenantino Eva Stockinger kaj la plej maljuna membro, s-anino Helene Plevka, 69-jara, estas ĝuste la nuna jubilea aĝo de Esperanto — 60 jaroj.

13 membroj estas malpli ol 30-jaraj, 16 estas naskitaj en la pasinta jarcento. Tio montris, ke la intereso pri E. estas en la aktuala tempo pli granda inter la plenaĝuloj ol en la generacio

pli juna. Konekse al tiu konstato s-ano H. Kraus aludis pri la neceso, ke la maturuloj gvidu la ideologie senradikajn gejunulojn al la kultura agado de Esperanto. Plue li informis, ke partoprenis 3 geinstruistoj; 58% de la membroj estis sinjorinoj. Post tio li menciis la grandajn malfacilojn, kontraŭ kiuj ni devis barakti dum la lernado. Ni nek disponis pri lernlibro, nek pri facila legaĵo. Oni devis limigi sin je plej konciza instruado kaj tamen, pro perdo de la restaj lecionoj en januaro kaj februaro, ni estis devigitaj prokrasti 3 gramatikajn lecionojn por la kurso de progresantoj. Malgraŭ ĉio ni povas esti kontentaj. Niaj novaj amikoj diligente lernis — kaj tion, kion ni senkulpe devis neglekteti, ni plenumos en la kurso por progresantoj, por kiu ni povos uzi kaj lernlibron kaj facilan legaĵon en formo de la tre rekomendinda „Senhalte al la celo“ de s-ano Norbert. En la daŭriga kurso oni faros ĝeneralan ripeton kaj traktos speciale tiujn ĉapitrojn el la gramatiko, kiuj estas malpli facilaj por aŭstrianoj. Ni speciale insistos pri parolekzercado, legado. E.-stilo, tradukoj, kantado, korespondo kaj paroladoj pri temoj specialaj.

Nun venis la ĉefa programo.

S-anino Claudia Löbl prelegis en admirinde flua maniero verkaĵeton „Moci, la porcelo“, kiun ŝi kompilis post la 8-a leciono. Al ŝi kaj al s-ano Robert Novacek, kiu parkere parolis „La Kapelo“-n de Uhland/Zamenhof, ni danke aplaŭdis.

La apogeon de nia vespero ni dankas al nia s-ano N. Hovorka. kiu, parolante jen Esperante, jen germane, klarigis al ni en sia interesega kaj elokventa maniero, kiom estas urĝe kaj grave, okupi nin pri la junularo, suferanta nun sian ideologian krizon. En la dua parto de sia parolado li direktis nian atenton al la rolo. kiun Esperanto ludas kaj ludu en Aŭstrio, kiu en sia centra kaj intergenta situacio estas lando plej taŭga por la apliko kaj agnosko de nia lingvo.

Post la tradicie forta aklamo, kiu sekvis liajn vortojn, s-ano Walter Kraus, kiu gvidos la novan kurson por komencantoj en Volksbildungshaus Alsergrund, laŭtlegis „La Sorĉlernanto“-n, la famekonatan poemon de Goethe, esperantigitan de H. Kraus.

Sekvis fine kantoj al la gitaro, prezentitaj de s-ano Hugo Kraus, kaj akompanate per lia gitarludo eksonis „Ĉe puto antaŭ l'urbo“ de Schubert kaj la Esperanto-Himno, kiujn nia kursanaro fervore kunkantis.

Ni esprimas nian dankon al ĉiuj kunhelpintoj kaj precipe al nia ĉiam agema aktivisto, s-ano Ullrich, kiu kun admirinda dediĉemo kaj lerteco administras la kursojn en Volksbildungshaus Alsergrund. H. K.

**Horn**

Horn, la bela urbeto en la arbara regiono de Aŭstrio, dimanĉe, la 9an de Marto 1947, havis grandan Esperantotagon.

La „Aŭstria societo de la amikoj al Esperanto“ kune kun la Esperanto-Grupo „Arbara-regiono“ aranĝis en la Park-kafejo porfamilian koncerton, kiu fariĝis granda sukceso por la Esperanto-movado de tiu ĉi urbeto.

La koncertorkestro Rehrl ludis gajigan vienan muzikon de Strauß, Ziehrer kaj Lanner. Dum la koncerto la membroj de la grupo „Arbara-regiono“ grandskale propagandis por nia ideo, disdonante al la gastoj 150 ekzempleroin de la Esperantogazeto „Die Weltsprache“ kaj pli ol 120 broŝuroin „Interview über Esperanto“. Entute pli ol 800 diversaj varbiloj estis disdonataj.

Prof. Dr. Kapitan de la gimnazio en Horn dum la paŭzo paroladis antaŭ la festgastoj pri la grava signifo de Esperanto por ĉiuj aŭstrianoj kaj la mondo.

R. Bartosch.

★

# INFORMOJ DE LABORISTA ESPERANTISTARO

## Rezolucio

La laboristaj esperantistoj de ambaŭ laboristaj partioj, kunvenintaj hodiaŭ je la dua memortago de la liberigo de Vieno el la nazia sklaveco, taksas necesa la kuniĝon por efektivigi la programon de laboristaj esperantistoj — nome: la servigon de Esperanto al la laboristaro.

Ili opinas, ke sur bazo de kooperativo (Arbeitsgemeinschaft), kunlaborante en lojala superpartieco, ili atingos tiun celon ĉefe

1. per reestigo de la „Proleta Esperanto-Korespondado“ (mallonge „PEK“), havanta la taskon korespondigi grupojn da laboristoj el nia lando, kiuj mem ne scias Esperanton, sed kiuj volas akcepti ĝin kiel tradukilon por korespondado kun samfakuloj de aliaj landoj;
2. per liverado de materialo, taŭga kaj valora por la laboristaro, al la nacilingvaj laboristaj gazetoj, kiu fontas el la PEK-agado;
3. per okazigo de ĉio necesa por la edukado de konsciaj laboristaj esperantistoj kaj ĝenerale por estigo de konsciaj kontraŭfaŝistoj;
4. per kreado de la fundamento por laŭtempe konsilinda fondo de FRAKCIO de laboristaj esperantistoj en la kadro de la Aŭstria Esperantista Federacio;
5. per subtenado de la aspiradoj de la Aŭstria Esperantista Federacio, kies superpartiecon kaj ĝisnunan agmanieron la kunvenintoj aprobas kaj sincere salutas;
6. per entreprenado de ĉio, kio sin montros necesa por la kreado de laborista Esperanto-asocio tutmonda, en kiu estas reprezentataj ĉiuj laboristaj esperantistoj, sen konsidero de ilia partianeco, kaj kiu akceptos la PEK-agadon kiel bazon de sia funkciado.

Laborista Esperantistaro.

## *Rezolucio pri Esperanto*

akceptita en la 35-a partikongreso en 1947 de la Hungara Socialdemokrata Partio.

„La socialdemokrata partio, fidele al sia ĝisnuna sintenado amika al Esperanto, kiu esprimiĝis per la decido en la partikongreso de la jaro 1927, en la sintenado de diversaj partiorganizoj kaj en la gazetaro de partio, eksciis kun kontenteco, ke grandparte komenciĝis la instruado lerneja de la lingvo Esperanto en multaj institutoj de Hungarujo ĝuste pro la apogo per la socialdemokrata partio. La partikongreso opinias necese, ke la lerneja instruado de la internacia lingvo Esperanto komenciĝu en kiel eble plej multaj specoj de lernejoj en deviga forma. La partikongreso opinias dezirinda la apogon kaj disvastigadon de Esperanto en la intereso de plifortigo de la internacia spirito en la laborista movado. La socialdemokrata partio akceptas Esperanton kiel unu el la lingvoj uzotaj en ĝiaj internaciaj rilatoj.“

**Laboristaj esperantistoj!**

Kun granda ĝojo vi certe legis la rezolucion de la hungara socialista partio pri la agnosko de Esperanto kiel lingvo internacia, egalvalora kun aliaj lingvoj. Ni do esprimu al la partia centro nian rekonon kaj skribu tiurilatajn leteroin al: Hungara Socialdemokrata partio, Rakacziut 43, Budapest.

Sed samtempe ni diskonigu ĉi tiun rezolucion en ĉiuj partiorganizoj de la aŭstria laborista movado kaj ni klopodu, ke ankaŭ niaj laboristaj partioj en la sekvontaj partikongresoj akceptu similan rezolucion favore al Esperanto. Ni aktivigu nian propagandon per la devizo: „Esperanto en la laboristajn partiojn kaj en la sindikatojn!"

**Aranĝo.** La unua kunveno de la unuigita laborista esperantistaro de Vieno okazis sub prezido de k-do Sager la 8. 3. 47 en la Palaco Koburg kun festa parolado de k-do Hovorka pri „Lenin", kiu estis aplaŭdegita de la ĉeestintaro.

La kunveno ankaŭ funebre nekrologis per parolado de k-do Haiderer la morton de pioniroj de la laborista esperantismo, de k-doj Mangada (hispana esp. verkisto kaj poeto), Lanti (redaktoro de „Sennaciulo", fondinto de SAT), Boubou (redaktoro de „Internaciisto", gasumita en la koncentrejo de Auschwitz), Bourguignon (redaktoro de „Infanoj sur Tutmondo", mortigita en la koncentrejo de Dachau), kaj ĉiuj aliaj laboristaj esperantistoj, kiuj pereis en la lastaj jaroj kiel viktimoj de faŝismo. La ĉeestantaro solidare leviĝis de la seĝoj por memori ilin.

Ferminte la kunvenon k-do Sager apelaciis al ĉiuj, ke ili subtenu nian aferon. La paroladon partoprenis kiel gastoj ankaŭ esperantistoj katolikaj kaj alitendencaj.

**Pri kio ni korespondu?** Ne eblas nuntempe vojaĝi tra fremdaj landoj. Sed ankaŭ en normala tempo la laboristoj ne multe povas profiti de tiaj vojaĝoj, ĉar mankas mono kpt. Sed tamen ni estu en kontakto kun niaj klasfratoj en aliaj landoj.

Pri kio korespondu la laboristaj esperantistoj?

Al ni ne interesas la florkulturo de Nederlando, kion kuiras la svisa sinjorino, kiamaniere estas la Pariza modo, aŭdi pri hindaj fakiroj, ricevi poŝtkartojn de Ameriko kun altegaj turdomegoj. Al ni laboristoj interesas la ĉiutaga vivo de la nederlanda maristo, esti en kontakto kun la francaj ministoj, aŭdi kiamaniere vivas la ĉina kulio, partoprene helpi al hispana popolo reatingi la tiel ŝatatan liberon, ricevi raportojn pri la rezistmovado en Grekio, sekvi la batalon de la hinda kolonia popolo por atingi la sendependecon sian, scii kial estas strikegoj en Usono ktp.

Tio estas, kion ni volas scii kaj tial ni starigu Esperanton en la servo de la socialisma korespondado.

Agu! (Franero.)

**Avizo.** Por kompili liston de ĉiuj socialistaj kaj komunistaj esperantistoj de Aŭstrio ni nepre bezonas vian adreson. Komuniku ĝin al ni, aldonante la partian apartenecon. Raportu pri viaj grupoj, pri via laboro niatendenca.

Skribu al k-do Ludoviko Sager, Wien 16., Maderspergerstraße 14.

**Radioprogramo de Asocio de Laboristaj Esperantistoj, Amsterdam.** Laŭ instigo de laboristaj esperantistoj FLE la nederlanda Radio-Unuiĝo sendos jenan Esperanto-programon je la 16.10 ĝis 16.25 horo (mezeŭropa tempo) je ondolongo 301 m: 3. 5. 1947 Verda kabaredo, 7. 6. 1947 Esperanto serve de la laborista movado.

Bonvolu sendi simpatiesprimojn al Radio-V. A. R. A., postbus 175, Hilversum, Nederlando, kaj petu disaŭdigon pri ekonomiaj kaj socialaj novaĵoj el Nederlando.

**Hungara E-Societo Laborista invitas Esperanto-mondkongreson.** Hungara E-Societo Laborista kaj Hungara E-Asocio (ĝenerala) en komuna diskut-

vespero decidis inviti Universalan Kongreson kaj samtempe SAT-Kongreson por 1949 aŭ 1950 al Budapest.

**El Sovetio** — (Leningrad) venis letero al Radio Praha, kies sendinto kun granda ĝojo konfirmis la aŭskultadon de Esperantlingva dissendo de Radio Praha, kiun li hazarde ekaŭdis. La sovetia s-ano skribas, ke la E-movado ŝajne malaperis en lia lando kaj petas informojn pri tio, ĉu la movado renoviĝis en la mondo.

El „Esperantisto Slovaka".

# KATOLIKA ESPERANTA VIVO

## Al ĉiuj aŭstriaj katolikaj Esperantistoj!

Ni informas ĉiujn aŭstriajn katolikajn gesamideanojn, ke ni preparas la refondiĝon de katolika grupo en la kadro de la AEF. Laŭ propono de samideanoj dum la prepara kunveno ni akceptas la historian nomon „Aŭstria Katolika Ligo Esperantista" (AKLE). La AKLE volas esti la oficiala katolika fak-grupo de la AEF kaj samtempe la landa asocio de la IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). La celoj de la AKLE estos varbado por nia lingvo en la katolikaj grupoj, rondoj kaj societoj kaj la reprezentanteco de la katolikoj en la AEF. La prepara kunveno de la iniciatoroj decide deklaris, ke la aliĝo al nia katolika grupo ne dependas de la membreco en iu ajn politika partio: Membroj de la AKLE povas esti ĉiuj gesamideanoj, kiuj staras sur la fundamentoj de la katolika kredo kaj kiuj vivas laŭ la doktrinoj de la Eklezio.

Gis nun ni formis provizoran plenuman komitaton, kiu estros la AKLE-on ĝis la momento, kiam estos eble fari elektojn. La prezidanto de ĉi tiu komitato estas sam. sekcia konsilisto Dr. Maximilian Führing, direktoro de la ŝtata ekzamenkomisiono por Esperanto; afergvidanta anstataŭulo estas sam. prof. Dr. E. J. Görlich, lektoro pri Esperanto ĉe la altlernejo por terkulturo en Wien, sekretario: sam. Walter Mudrak; kasistino: sam. Maria Mudrak. Membroj de la komitato: sam. prof. Dr. Brunhilde Flasch, Leopold Chiba, kalk. kons. Siedl, Christine Siedl kaj Dr. Halbedl (Knittelfeld). La provizora sidejo de la AKLE estas ĉe nia samideano Walter Mudrak, Wien, III. Beatrixgasse 19/9, al kiu vi bonvolu sendi ĉiujn komunikaĵojn, aliĝilojn k. t. p.

Ni komunikas ankaŭ al ĉiuj interesemuloj, ke ni ekprenis kontakton kun la ekleziaj aŭtoritatoj en Wien kaj ke ni esperas, ke ni trovas la eblecon labori kiel oficiala katolika Esperanto-ligo en la kadroj de la Katolika Agado. Ni petas samtempe ĉiujn gesamideanojn, kiuj havos la kontakton, ke ili preparos samcelan agadon en la aliaj diocezoj de Aŭstrio. Bonvolu varbi por nia ideo en la rondoj kaj societoj katolikaj de via ĉirkaŭaĵo! Ni publikigos pli detalan komunikaĵojn en la venonta numero de la revuo.

**„Katolika Esperanto Vivo."** Ni informas niajn gesamideanojn, ke la Aŭstria Esperanto-Revuo, la oficiala organo de la AEF, publikigos de nun sub la titolo „Katolika Esperanta Vivo" niajn komunikaĵojn regule. Ni dankas al la estraro de la AEF.

**Espero Katolika.** La oficiala organo de la IKUE kaj de la internacia katolika Esperanto-movado estas la monata revuo „Espero Katolika", kiu ricevis la benon de la Sanktaj Patroj. La Espero Katolika estas ankaŭ de la ordinara vidpunkto unu el la plej bona-

spektaj kaj bonstilaj Esperanto-revuoj de la mondo. Neniu katolika Esperantisto forgesu aboni ĝin. La peranto por Aŭstrio estas nia sekretario Walter Mudrak, Wien III., Beatrixgasse 19.

**Konsuloj de la IKUE.** Kiel la aliaj internaciaj Esperanto-organizoj ankaŭ la IKUE havas delegitojn en la diversaj landoj kaj urboj de la mondo. La delegitoj de la IKUE nomiĝas konsuloj aŭ ĉefkonsuloj. Provizore nia afergvidanta vicprezidanto prof. Dr. E. J. Görlich transprenis oficon de ĉefkonsulo de IKUE kaj nia sam. sekretario Walter Mudrak la oficon de vickonsulo de la IKUE en Aŭstrio. Ni petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj volas transpreni la oficon de IKUE-konsuloj, skribi al nia sekretariejo.

**Nekrologo.** Denove unu el la lastaj malnovaj gefideluloj en Wien forlasis nin: s-anino Karola Mayrleb, kiu la 24. 2. 1947 mortis 76 jara. Si vere estis eminentulino; jam de 1909 aktiva esperantistino kaj prezidantino de la Virina Sekcio en la Unua Esperanto-Unuiĝo ŝi kunlaboris ĝis 1938. En la U. K. en Krakovo 1912 ŝi oficiale parolis kun d-ro Zamenhof kaj dum la U. K. en Wien 1924 ŝi estis kun virina delagacio ĉe ties vidvino, transdonante al ŝi diplomon. Sincere pia kaj animfortigita en la sankta katolika kredo ŝi foriris el tiu nepaca mondo. La mortintino restas en nia daŭra memoro.

# Raportoj el la Federaciaj Landoj

**Esperantista Rondo Ebensee, Oberösterreich.** Grupa festvespero okaze de la finiĝo de la dua E.-kurso estis aranĝata la 14. 2. 47 en la gastejo „König".

La grupestro s-ano Heißl salutis la ĉeestantojn, precipe li bonvenigis la kurspartoprenintojn, gratulis ilin pro la sukceso, ke ili frekventis la kurson ĝis la fino, kaj invitis ilin aniĝi al la grupo, kie ili havas la plej bonan eblecon kaj helpon por perfektiĝi kaj fariĝi veraj esperantistoj.

Al s-ano Lezak li dankis pro lia modela kursgvidado kaj petis lin ankaŭ en estonteco dediĉi sian forton, sian instruistan sperton kiel longjara ŝtate ekzamenita E.-instruisto, al la grupo.

Poste fraŭlino Berti Loidl deklamis el la verkaro de la majstro la poemon „La vojo". La germanan tradukon diris s-anino Helga Froschauer.

Konsiderante la ĉeeston de Esperanton ne komprenantaj gastoj s-ano Weißkirchner faris la festparoladon en germana lingvo. En Esperanto parolis s-ano Dr. Zangerle (partopreninto de la unua kurso) pri la grupa movado.

Aktualan poemon „La mondpaco" de Dr. Pabisch recitis en Esperanto kaj germane s-anino Grete Höller.

Nome de la kurspartoprenintoj s-anino Berta Loidl kun varmaj dankvortoj transdonis al la kursgvidanto profesoro Lezak libron kiel memoraĵon. Videble surprizate pro tiu ne atendita honorigo la profesoro kore dankis kaj per pli longa parolado li klarigis la praktikan kaj kulturan celon de la Esperantismo.

La plua tempo de la vespero estis dediĉata al muziko, humoro kaj amuzo. S-ro Fred Krempl, iluzionisto, humoristo kaj muzikisto plene sukcesis realigi ĉi tiun programon. Baldaŭ regis senĝena, natura gajeco kaj kiam la malfrua horo admonis al ekforiro ĉiuj bedaŭris jam devi adaŭi.

La E-grupo ankaŭ distribuis grandnombre flugfolioj kun efika varbteksto por Esperanto signitan de F. W. kaj pruvis per tio sian aktivecon en ĉi tiu regiono.

**St. Veit bei Graz, Steiermark.** La 24. 2. 47 komenciĝis E-kurso kun 12 partoprenantoj, inter ili 3 instruistoj, aranĝita kaj gvidata de nia tre agema s-ano Josef Eder. La kurson vizitas

membroj de la vojaĝsocieto „Der Wanderer“ (La migrulo) kaj la gazeto „Die Weltsprache“ kun ĝia bonega-E-kurso servas kiel lernilo. S-ano Eder ankaŭ verkis kaj varbcele distribuis efikan hektografiitan flugfolion.

**Pariza Letero al E-grupo Landeck.**

Parizo, 8. 1. 47.

Denove hejme post sufiĉe bona vojaĝo, mi volas ankoraŭfoje danki ĉiujn gekamaradojn de via klubo pro la simpatia Esperanta akcepto, kiun mi scias ŝati.

Kiel mi povus forgesi tiun entuziasmon, kiun estigis mia mallonga restado en via urbeto? Kia plezurego vidi, ke vere Esperanto vivas, ke nia ideo ekzistas ankaŭ en via lando tiel malproksima de mia patrujo.

Kvankam mi venis ne atendite, mi tamen konstatis, ke mia ĉeesto tuj estis disvastigata inter la esperantistoj, kiam mi alvenis. Kia surprizo aŭdi la tutan familion de la klubprezidanto paroli Esperante- eĉ la hundo komprenis la lingvon. Kiam mi post promeno vespere eniris la domon „Espero“ de k-do Hilkersberger, kia surprizo! En la salono estis vestataj en regionaj vestaĵoj almenaŭ 20 tre junaj vizaĝoj kaj ili atende rigardis min kun miro. Antaŭ tiuj gejunuloj miaj dankaj paroloj eliris ĝoje. Tiuj geknaboj ŝajnis ne kompreni, ke eksterlandano povas interparoli kun ili. La salono havis festan esperantistan atmosferon: flago kun verda stelo vidiĝis, tablego estis provizita agrable malgraŭ la modestaj manĝaĵoj. Mi povis konstati, ke ĉiuj rimedoj estis uzitaj por la sukceso de tiu akceptfesteto de internacia Esperantista amikeco. Malnovaj samideanoj atenditaj venis kaj tiam la festeto komenciĝis. Mi havis la honoron prezidi ĝin. La monologoj Esperantaj de la geknaboj tre plaĉis al mi kaj mi estis fiera pri nia ideo, kiam tiuj junaj buŝoj kantis „La Espero“-n kaj aliajn kantojn Esperante. Tiuj gejunuloj donis vere bonan ekzemplon pri nia afero kaj la fervoro de kelkaj malnovaj gekamaradoj, kiuj vigle kaj flue parolis kun mi.

Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti kun vi la Zamenhofan feston en Innsbruck la 15. 12. 46, sed tamen mi havis la kontentecon kontaktiĝi kun via interesa medio, kie mi trovis la bonan spriton de nia granda familio. Tio estis vera pruvo, ke Esperanto estas ponto de la amikeco inter la popoloj. Kvankam mi jam havis okazon paroli Esperante en eksterlando, mi neniam sentis tiom da entuziasmo kiel dum mia mallonga restado en tiu vigla Esperantista familio, kiu povas esti fiera montri la ekzemplon de la reviviĝo de Esperanto en Aŭstrio, kiu longe devis suferi sub la malamikoj de nia kara lingvo. Familio Hilkersberger estas vera modelo de idealismo por la aliaj aŭstriaj gesamideanoj.

Tiu 2a Januaro 1947, bela tago de la elpruvado de fideleco al nia ideo, estas ankaŭ signo de bona prospero de nia movado en Aŭstrio en la estonteco. Mi deziras, ke tio certe efektiviĝu.

Via pariza amiko
Guy Dejardin.

**Fervojista esperantista renkontiĝo en Landeck**

La verfojista fakgrupo okazigos la 9. kaj 10. 8. 1947 renkontiĝon en Landeck, Tirol, inter la fervojistaj esperantistoj el ĉiuj federaciaj landoj de Austrio.

Programo: sabate la 9. 8. ĉj. je la 20 a h. salutvespero en la kantino fervojista en Landeck, ĉefe prezentota de la Verda Junularo de Landeck sub gvidado de s-ano Hilkersberger.

Dimanĉe la 10. 8. ĉj. je la 7 a h. matene ekskurso al Fritz-kabano.

Por parolado pri aktuala temo estis invitata estrarano de AEF.

La partoprenontoj en la renkontiĝo el Wien anoncu sin pro manĝa aranĝo al Fervojista Fakgrupo Esperantista, Josef Zink, Wien X., Endlichergasse Nr. 2—4. IV/17. El la federaciaj landoj oni skribu al delegito Alois Hilkersberger en Landeck, Haus „Espero“, Tirol.

Ankaŭ nefervojistaj geesperantistoj kore estas invitataj partopreni la renkontiĝon kaj ankaŭ ili anoncu sin ĉe la nomitaj adresoj.

Pluaj detaloj pri la renkontiĝo sekvos ĝustatempe.

Notu novajn adresojn de delegitoj: Johann Sighartner, Frankstraße 57, II. Stiege, Linz, O.-Ö. — Anton Huber, Salzburg-Gnigl, Minnesheimstraße 17, Salzburg.

# Austria Esperanto-Instituto

**1. La nova aŭstria popolhimno.**

La Aŭstria Esperanto-Instituto decidis en sia kunsido je la 12a de Marto 1947 fari publikan alvokon al la aŭstria esperantistaro por atingi kiel eble plej bonan tradukon de la nova aŭstria popolhimno (teksto de Paula Preradovic, laŭ la melodio de Mozart „Fratoj, manon donu kore"). La konkurso okazas sen premioj, la plej bona traduko estos elektata de trimembra komitato. Por ke ĝi povu juĝi objektive, senkonsidere de la persono, bonvolu sekvi jenan manieron de prezento: Sur la koverto, adresita al Aŭstria Esp.-Instituto, notu: „Aŭstria himno", sur la folio kun la Esp.-traduko ne troviĝu la nomo de la tradukinto, sed nur ia „signovorto" (aŭ signocifer[ar]o). En dua, enmetita koverto, bone fermita, sur kiu la signovorto estas ripetita, estu sciigita la nomo de la tradukinto estos komuniadreso. Tiuj duaj kovertoj estos malfermataj nur post fino de la literatura juĝado. — La plej bona traduko kun la nomo de la traduktino estos komunikata al la instruministerio kaj publikigata en la Aŭstria Esp.-Revuo. Alsendoj laŭ la diritaj kondiĉoj estos akceptataj ĝis fino de Junio 1947.

**2. Lingva rimarkigo pri la uzo de „po"** (al la artikolo „Oftaj gramatikaj" en n-ro 4—5/1946).

Eminenta eksterlanda samideano atentigis nin, ke laŭ la Zamenhofa uzo „po" estas prepozicio kaj ĉ i a m prenas post si nominativon.

La Aŭstria Esperanto-Instituto en sia kunsido ie la 15a de Januaro diskutis pri tiu ĉi alskribo kaj decidis kompletigan rimarkigon:

Efektive Zamenhof skribis pri la uzo de „po" jenan Lingvan Respondon (en La Esperantisto, 1891):

„Inter la esprimoj „doni po 2 pecojn" kaj „doni po 2 pecoj" estas ankoraŭ malfacile diri, kiu estas la pli bona, kaj tial ambaŭ esprimoj estas uzeblaj kaj bonaj. Tamen konsiderante, ke danke la intervenon de la vorto „po" la „pecoj" jam ne dependas rekte de la „doni", ni konsilas uzi post „po" (tiel same kiel post „da") la nominativon („doni po 2 pecoj"). Alia kaŭzo por tiu ĉi konsilo estas ankaŭ la cirkonstanco, ke laŭ nia opinio „ĉie, kie oni dubas inter la nominativo kaj akuzativo, oni devas uzi la nominativon".

Laŭ tio oni devas konsenti, ke en frazo kun transitiva verbo, post „po" a ŭ  n o m i n a t i v o  a ŭ  a k u z a t i v o estas uzebla, do ambaŭ formoj ne riproĉindaj.

**3. Disponigu librojn por ekzamenaspirantoj!**

Multaj samideanoj, precipe ekster Vieno, deziras prepari sin por la ŝtata ekzameno pri instrukapableco, sed havas preskaŭ neniujn el la bezonataj libroj. Tial la Aŭstria Esp.-Instituto jam faris per cirkulero urĝan alvokon al ĉiuj Esp.-grupoj kaj konataj samideanoj, ke ili laŭpove pruntedonu lernlibrojn, vortarojn, la „Fundamentan Krestomation", la „Lingvajn Respondojn" kaj diversajn literaturaĵojn al la Aŭstria Esp.-Instituto, kiu disdonos la librojn kontraŭ atestoj al la bezonantoj.

Esperantistoj, subtenu tiujn, kiu volas fariĝi ŝtate aprobitaj Esperantoinstruistoj, kaj pruntedonu librojn, kiujn vi mem ne bezonas!

**4. Novaj paroladoj en la „Centro“.**

La Aŭstria Esp.-Instituto okazigas jenajn novajn paroladojn en la kunvenĉambro de la sekretariejo, Vieno I., Neutorgasse 9 (ĉiam la lastan ĵaŭdon de la monato, je la 18a horo):

La 24an de Aprilo: D-rino Flasch: La virino kaj la internaciaj problemoj,

la 29an Majo: Dir. Menacher: pri la vortfarado en Esperanto,

la 26an de Junio: S-ano R. Cech: pri la historio de Esp. en Aŭstrio.

# *INTERNACIA ESPERANTO-MOVADO*

**32-a Universala kongreso de Esperanto**

Bern, Svislando, 26. 7.—2. 8. 1947

Provizora programo de la fakkunsidoj

Lundo, la 28a de Julio.

14.30. Kooperativa E-Ligo (1. kunveno). Adreso: S-ro A. A. Ager, 8, Pelham Road, Beckenham (Kent), Anglujo.
Tutmonda E-Jurnalista Asocio Adreso: LKK.
Kristana E-Ligo Internacia (KELI) 1. kunveno. Adreso: S-ro Ivar E. Karlsson, Box 877, Leksand, Svedujo.

Mardo, la 29 a de Julio.

14.00. La Bar-rompantoj. Adreso: S-ro Pastro W. J. Downes. 7 Hill Street, Kingswood, Bristol, Anglujo.
Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj. Adreso: XPDO House, Didcot (Berks), Anglujo.

14.30. Esperantistaj Rotarianoj (Lunĉo je la 12.15 ĉe la Bernaj Rotarianoj). Adreso: IEL, Heronsgate, Rickmanswort (Herts), Anglujo.

Merkredo, la 30 a de Julio.

9.00. I. L. E. P. T. T. La subasocio: Internacia Ligo de E-Poŝt- kaj Telegrafoficistoj (P. T. T.). Adreso: S-ro R. Filliatre, Acheres (Sine et Oise), Francujo.
Movado Al Abundo (1. kunveno). Adreso: S-ro E. E. Jelland, 14 rue de la Republique, Marseilles, Francujo.
Psika esploro kaj spiritismo. Adreso: S-ino Nora Holmes, 38 Fillebrook Road, London, E, 11.

14.00. Universala Ligo. Adreso: Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.
K. E. L. I. (2. kunveno).

Ĵaŭdo, la 31 a de Julio.

9.00. I. L. E. P. T. T. La subasocio: Fervojistoj. Adreso: S-ro E. Keiser, Hubacherweg 7, Liebefeld, Bern.
Oksfordgrupo. Adreso: S-ro Derrik P. Faux, The Bungalow, New Drive, Painswick (Glos), Anglujo.

14.00. Bahaismo. Adreso: F-ino Etty Graefe, 6, Cours des Bastions, Geneve, Svislando.

14.00. Pacifistoj. Adreso: S-ro V. Verda 14, Leopoldsstreet Leeds 7, Anglujo.
Blinduloj. Adreso: S-ro Theo Kutzli, Schibenackerstr. 6. St. Gallen-Ost, Svislando.

Vendredo, la 1 a de Aŭgusto.

9.00. Movado Al Abundo (2. kunveno).
Policista Ligo Esperantista. Adreso: S-ro Schwartz, 10, Rue Engelhardt, Strasbourg, Mainau, Francujo.
Kooperativa E-Ligo (2. kunveno).

14.00. Denaska Esperantistaro. Adreso: S-ro J. Guillaume, 34 rue de Chabrol, Paris, Francujo.
Psika esploro kaj spiritismo. (Dua kunveno.)
Pro diversaj kaŭzoj ankoraŭ mankas la dezirita tempo por kelkaj aliaj asocioj.
Katolikoj, Tempo ankoraŭ ne fiksita. Turnu vin al Pastro J. De Maejer, College Sainte Gertrude, Vivelles, Belgujo.

**Alvoko al la fervojistoj**

Ĉiuj fervojisto intencantaj partopreni la Esperanto-Mondkongreson 1947 en Bern estas petataj anonci sin tuj ĉe ni (sendepende de la kongresaliĝo). Gvidantoj de karavanoj komuniku al ni proksimume la nombron de la karavananoj indikante ĉu ili estas el la administracio aŭ alia fako de la fer-

vojo. Ni volas aranĝi specialan aranĝon por fervojistoj (vizitoj, filmoj, paroladoj). Deziroj, proponoj kaj anoncoj de paroladantoj estas dankeme atendataj. Pri demandoj por la kongreso, loĝejo, profesiaj kunsidoj ni plezure respondos. La korespondaĵojn ĉi rilatajn oni bv. sendu al la sekvanta adreso: Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, Hubacherweg 6, Liebefeld-Bern, Svislando.

**Registarano d-ro Enrico Celio, Honora Prezidanto de la 32-a Universala Kongreso de Esperanto**

La svisa registaro rajtigis sian vicprezidanton, s-ro d-ro Enrico Celio, ministro de la Federacia poŝt- kaj fervoj-departemento, estiĝi la Honora Prezidanto de la 32-a U. K. en Bern. Per tio la svisa registaro montris al la Esperanto-movado grandan honoron. Ĉar per tio ili esprimas sian ĝojon, ke la venonta U. K. okazos en Svislando kaj per tio ili ankaŭ aprobas la laŭdindan celon de la E-movado kaj esprimas samtempe sian simpation por la ideo de mondlingvo. La registaro transdonis sian plej koran deziron por la efektiviĝo de la kongreso. Dum la solena malfermo de la kongreso la 27. 7. 47 verŝajne ministro d-ro Celio salutos la kongreson nome de la svisa registaro.

La LKK informas la kongresanojn de la 32-a U. K., ke la restaddemando estas ege malfacila. Pro tio petas la LKK, ke ĉiu kongresano tuj sendu sian mendon aŭ por hotelĉambro aŭ por ĉambro ĉe privatulo.

**UEF kunkovas Tutmondan Esperanto-konferencon 1948**

Heroldo de Esperanto publikiigs en numero 3/1947 alvokon de Franca Esperanto-Unuiĝo pri okazigo de Tutmonda Esperanto-Konferenco en Parizo pentekoste 1948, kies nura lingvo parolata estos Esperanto.

Tiu konferenco havos kvar komisionojn:

1. Politika komisiono, kies membroj estos nur ŝtatestraranoj, parlamentanoj kaj oficialaj reprezentantoj de politikaj partioj diverslandaj;

2. Ekonomia komisiono, kiel membroj estos reprezentantoj de sindikatoj, komercaj ĉambroj, industriistoj, komercistoj ktp.;

3. Eduka komisiono, kies membroj estos edukistoj, kleruloj pri Radio, kino, teatro, beletristiko ktp.;

4. Scienca komisiono, kies membroj estos sciencistoj ĉiuspecaj.

UEF alvokas ĉiujn landajn E-asociojn, ke ili klopodu, por ke ŝtatestroj, parlamentanoj ktp. nepre necesaj por la sukceso de tiu konferenco, ekpraktiku Esperanton. De la sukceso de tiu konferenco dependos la finsukceso de Esperanto.

Ĉiuj, kiuj deziras helpi la preparon de la konferenco, tuj skribu al: Franca Esperanto-Unuiĝo, 34 rue de Chabrol, Paris.

**20-a Kongreso de SAT**

en Aarhus, Danlando, 2.—7. de Aŭgusto 1947.

Adreso de OKK: Prezidanto k-do Magnus Jakobson, Brendstrupvej 8, Aarhus, Danlando.

Kongresa kotizo 13 dKr por SAT-anoj. Kie ne eblas sendi monon al Danlando, oni pagu al la landa peranto.

Estis eldonita plaĉaj kongresaj glumarkoj je la prezo de 1 dKr por 30.

Anoncojn akceptas la landa peranto por Aŭstrio: k-do Ludwig Sager, Maderspergerstraße 14, Wien XVI.

Li ankaŭ peras jarabonojn al „Sennaciulo", oficiala organo de SAT. Abonprezo aŭstr. ŝil. 7.— Skribajn informojn kontraŭ reafranko.

**Esperantista altlernejo en Doksy, ĈSR.**

De la 19a de Julio ĝis la 2a de Aŭgusto 1947 ni aranĝos jam duafoje en Doksy ĉe Mácha-lago, situanta en ĉarma regiono de Bohemio, ĈSR, someran lernejon kaj seminarion, nunjare jam ankaŭ por eksterlandaj gastoj. EAĈSR elektis Doksy Internacia Esperantista Somerloko. Ĉiuspecaj amuzaranĝoj (triakta historia komedio

„Nokto en Karluv Týn“ de Vrchlický, ludita en la jaro 1921 dum la XIIIa Universala Kongreso en Praha, kino, artista muzikvespero, dancoj, somera karnavalo, ekskursoj, sportoj, banado, bivaka fajro kun komunaj kaj unuopaj kantoj ktp.) certe kontentigos la ĉeestontojn. Direktoro de la lernejo kaj seminario: PhDr. A. Pitlik. E-lektoro de la Teknika Altlernejo en Praha. Sentraduka instruado, unuagrada kurso laŭ Ĉe-metodo. Eksterlandaj gastoj tre kore bonvenigataj rajtas partopreni senkotize. Salutkartoj por letervespero petataj. Aliĝoj al: Václav Špůr, disponanto de ŝparejo, Doksy ĉe Máchalago, Bohemio, Ĉehoslovakio.

**Letero el Bulgarujo al AEF**

Karaj kamaradoj,

ni skribas nome de la legejo „Ivan Vazov“ el Plovdiv kaj celas per tio reciprokan korespondadon kun aŭstriaj esperantistoj kaj la vasta mondo. Tiamaniere ni deziras ricevi multajn leterojn pri la vivo, kulturo, ekonomio kaj politiko en Aŭstrio, kiu en la pasinto gastame malfermis la pordegojn de siaj unversitatoj al nia bulgara junularo por doni kleron al ĝi.

Laŭ via deziro ankaŭ ni volonte informos vin pri la vivo en nia lando. Ni rakontas al vi, ke antaŭ 23 jaroj en Bulgarujo ekprenis la regadon politikistoj, kiuj starigis reĝimon de faŝista diktaturo. Tamen la bulgara popolo ne senage klinis la kapon, nek rompiĝis la volo pri liberiga batalo. Kontraŭe, ĝi entreprenis amasan reziston kaj fine la 9. 9. 1944 nia popolo sukcesis faligi la faŝistan reĝimon kaj starigi sian regadon, la popolan regadon, nome, demokratan reĝimon, kiu garantias ĉiujn rajtojn al la civitanoj.

Ni skribas en la nomo de legejo „Ivan Vazov“. Ivan Vazov estis la plej granda poeto bulgara, mortinta en 1921. Li ricevis la honoran titolon: Poeto popola.

Nia legejo estas fondita en 1940. Tiaj legejoj en Bulgarujo la unuan fojon fondiĝis en 1856, kiam nia lando ankoraŭ estis sub turka jugo. La legejoj per sia kleriga agado influis la batalspiriton en la bulgara popolo kontraŭ la sklavigantoj turkaj. Post nia liberigo de fremda jugo en 1877—1878 fare de la venkinta rusa soldataro, la legejoj ankaŭ ludis gravan rolon en la kultura vivo. Nun la legejoj denove estas kultur-klerigaj centroj havantaj la grandan celon elradikigi nescion kaj malkleron. Ni bone scias, ke popolo ju pli klera kaj kulturema, des pli bone kapablas aranĝi sian vivon survoje al demokratio kaj progreso. Adreso de nia legejo: Čitalište „Ivan Vazov“, str. Rakovsky 2, Plovdiv, Bulgarujo.

Kr. Vlahkihon.

Rim. de la redakcio: Ni esperas, ke multaj aŭstriaj esperantistoj profitas la okazon ekkorespondi kun niaj bulgaraj samcelanoj kaj tiamaniere ligi intiman kaj amikan kontakton inter ambaŭ popoloj.

**La greka registaro favoras Esperanton en la lernejoj**

La Ministrejo de Kultoj kaj de Nacia Instruado de la Helena Reĝlando eldonis la 2. 12. 1946 cirkuleron pri la instruado de la tutmonda helplingvo Esperanto. Gi tekstas:

Al s-roj Generalaj Inspektoroj de la Elementa kaj Mezgrada Instruado, Direktoroj de la Pedagogiaj Akademioj kaj de la Eksperimentaj Lernejoj de la Universitatoj de Atine kaj Tesaloniki kaj Direktoroj de la Lernejoj de Mezgrada Instruado:

Konsiderante la gravecon, kiun akiras ĉiutage en la civilizita mondo la Tutmonda Helpingvo „Esperanto“ kaj rememorigante al vi niajn antaŭajn Cirkulerojn sub Num 55.517 de la 28. 10. 1929, 65.896 de la 7. 11. 1931, 59.433 de la 28. 10. 1932, 94.066 de la 9. 10. 1939 kaj 71.639 de la 24. 8. 1946 „Pri la Instruado de la Tutmonda Helplingvo Esperanto“ al la lernantoj de la Gimnazioj kaj Pedagogiaj Akademioj de la Stato, ni petas, ke vi faciligu ĉiamaniere tiun ĉi instruadon, kiun akceptis fari tute senprofite Profesoroj Diplomitaj de „Supera Helena Esperanto-Instituto“ de Atine.

Estas oportune, ke Sroj Direktoroj de la suprecititaj (Alt)Lernejoj klarigu, antaŭ la komenco de la Esperanto-kurso, la altan gradon, kiun atingis en la nuntempa civilizacio tiu ĉi Lingvo kaj rekomendu samtempe al la Lernantoj, ke ili sekvu akurate kun amo kaj intereso la instruatajn kursojn.

Krom tio, ni rekomendas al la suprecititaj Sroj Direktoroj la legadon de la dumonata Periodaĵo „Helena Esperantisto", Oficiala Organo de Helenaj Esperantistoj.

La Ministro
A. Papadimos

**Svedujo helpas al Aŭstrio**

La urbo Stockholmo transdonis fine de 1946 al la urbo Vieno du kompletajn instalaĵojn por la fabrikado de tielnomitaj Vibro-ŝtonoj. Tio estas grandaj brikoj produktataj el difektitaj kaj polvigitaj brikoj de detruitaj konstruaĵoj. Vibro-ŝtonoj enhavas plurajn izoligajn ĉelojn kaj pezas po 16 kg. Pro sia izoliga efiko, ili precipe ankaŭ taŭgas por la konstruado de koloniaj domoj kaj la komunumo Vieno en 1947 per la Vibro-ŝtonoj konstruos 1200 de tiaj domoj kaj dankas tion al la grandanima sveda helpo.

**Aŭstriaj infanoj en Belgujo**

La 28. 2. 1947 iris la dua transporto kun 500 aŭstriaj infanoj al Bruselo, de kie ili estis ekceptataj dum tri monatoj de belgaj familioj. Krom aliaj landoj ankaŭ Belgujo enviciĝis en la fronton de sociala helppreteco por la infanoj, la plej senkulpaj viktimoj de la kruela milito. Aŭstrio pro tio ŝuldas al la belga popolo multan dankon, al kiu danko volonte aliĝas ankaŭ la aŭstria esperantistaro.

**Nekrologo pri E. Lanti**

Kun granda bedaŭro ni sciiĝis pri la morto de E. Lanti, kiu la 17. 1. 1947 en franca hospitalo en Meksiko sin mem mortigis por fini netolereblajn kapdolorojn.

E. Lanti estis la fondinto kaj spirita gvidinto de SAT kaj ankaŭ iniciatis le eldonon de la multe ŝatata „Plena Vortaro".

Ne konsiderante la demandon, ĉu kaj kiom oni povis konsenti la pensojn kaj sennaciecan doktrinon de Lanti, ni rekonas, ke li certe estis bonega esperantisto, lerta oratoro kaj verkisto, kies artikoloj kaj libroj ĉiam kaj ĉie vekis intereson. La internacia E-movado perdis en li eminentan esperantiston kaj la laborista E-movado (SAT) multe ŝatatan gvidanton.

**Finnlando akcelas Esperanton**

En la popola lernejo de la urbo Kullaa Esperanto estis enkondukata kiel deviga instrufako. En la klasoj 1—4 ĝi estas instruata semajne po 1 horo kaj en la klasoj 7—8 semajne po 4 horoj.

**Argentina Esperanto-Kongreso**

okazas inter la 3.—6. 4. 1947 ein Buenos Aires kaj la argentinaj esperantistoj preparis ĉion por sukcesigi la kongreson.

**Esperanto en Maroko**

La esperantistaro en Maroko, kiu grupiĝas ĉirkaŭ „Afrika Revuo" (iama Verda Flamo), lerte redaktita de s-ino Irene Fink, tre vigle laboras por disvastigi Esperanton en tiu „nigra terparto".

La 21. 12. 46 okazis en la liceo Mangin en Marrakech ekzameno pri Esperanto kaj la ekzamenitoj ricevis ateston. En la sama urbo okazis prelego publika pri Esperanto. — En Casablanca okazis la 5. 1. 1947 la ĝenerala kunveno de la E-societo. — En Meknes okazas E-kurso.

**Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj „La amikoj al Esperanto"**

„La Rondo" — organo de Aŭstralia E-Asocio en numero 12/1946 priparolis la fondon de Aŭstria Societo de Amikoj al Esperanto kaj iniciatas eventuale fondi similan societon en Aŭstralio.

**Tutmonda skolta korespondado**

„Esperantisto Slovaka“ — gazeto de slovakaj esperantistoj alvokas la skoltojn en tutmondo korespondadi kun slovakaj skoltaj rondetoj kaj deziras priskoltajn artikolojn. Adreso: Žilina, Slovensky, Č. S. R.

**Simbolo**

Dum la milito multaj partoj de Tokio estis detruitaj, ankaŭ la parto, kie la japana Esperanto-Instituto havis sian sidejon. Ĉio ĉirkau ĉi tiu domo estis ruinigita, sed la Esperanto-Instituto saviĝis kaj staras tutsole kiel s i m b o l o en mezo de la ruinamasoj kun la verda stelo super la portalo.

(El „Dansk Esperanto-Blad“.)

**Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio**

Multaj ĵurnalistoj el 21 landoj anoncis sin por fakasocio ĵurnalista kaj kelkaj proponis, ke ni fondu la unuan estraron en Skandinavio, kie estas proporcie la plej multaj aligitaj, ni konstituis post voĉdonado la sekvantan estraron: Ĉefredaktoro C. Hilmer Johansson, Östgöten, Linköping, Svedlando, prez. Redaktoro Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedlando, sekr. kaj kasisto; redaktoro Rich. G. Nielsen, Langelands Tidende, Rudköping, Vicprez. ktp.

Fakkongresoj estas preparataj en Bern dum la U. K. 1947 kaj dum la SAT-Kongreso en Aarhus 1947. Ĉiuj, kiuj partoprenos tiujn kongresojn estas petataj sciigi tion al la sekretariejo. Ni invitas vin al membreco en nia asacio. Reprezentanto por Aŭstrio estas Dr. E. J. Görlich. La jarkotizon de 5 ŝil. oni sendu kun indiko „Jurnalista Asocio“ al la sekretarieio, Wien I., Neutorgasse 9.

**Peto de s-ro Brendon Clark, Nov-Zelando**

Ni publikigis en iama „Mitteilungsblatt‘ Aprilo-Majo 1946, korespondpeton de s-ro Brendon Clark. Pro tio li ricevis lavangon da leteroj, kiujn li ne ĉiujn povas respondi. Li dankas al ĉiuj pro la ricevitaj leteroj, sed petas pardonon pro nerespondo al jenaj s-anoj: M. Wesely, J. Zeiner, J. Labordus, J. Lievestro, H. Valckenier, Dr. E. Sladowski, Poldi Lager, L. Oberlechner, J. Doppelreiter, H. Bronec, R. Werner, F. Noggler, J. Javernik, J. Hofer, M. Umnik, G. Hofstatter, H. Bachmayer, J. Hajny, O. Horodeckyj, E. von Socher, J. Wyngaarden, M. Kreutzer.

**Sokol-festoj en Praha 1948**

estas titolo de informilo, kiun en esperanto eldonis Centra asocio de ĉehoslovakaj gimnastoj Sokol en Praha. Niaj legantoj povas ĝin senpage ricevi skribante al: Sokolský slet, Praha III., Tyršův dům. Petu samtempe pli detalan ilustritan esperanto-broŝuron pri Sokol, kies eldono estas preparata.

**Invito al sveda junularkunveno!**

La 12.—15. 7. 1947, okazos junularkunveno esperantista en J u r s l a apud la urbo N o r k ö p p i n g en la mirinde rela regiono de Kolmarden. Bonegaj ban- kaj sporteblecoj!

La partoprenontoj loĝos en bonega „esperantista somerhejmo“ kaj oni aranĝos malmultekostan manĝaĵon. Bona tendkampo troviĝas por tendemuloj.

La programo ankoraŭ ne estas tute preta, sed ni promesas, ke ĝi estos enhavoriĉa.

Do, ni invitas eksterlandajn gejunulojn al nia kunveno kaj promesas helpi al ĉiu, kiu deziras veni al nia lando ĉi-somere. Bv. peti informojn kaj aliĝilojn ĉe: S-ro Karl E. Andersson, Jursla 5, A B Y, Svedlando.

Sveda Esperanto-Federacio —
Junularo Sekcio.
Tutmonda Junular-Organizo —
Sveda Sekcio.

**Esperanto en la praktiko**

„Dana-Esperanta gazetara servo“ skribas:

Helpu doni pruvon pri la utileco de Esperanto en la ĉiutaga laboro de la gazetaro.

Por pruvi, ke Esperanto estas tre valora kaj utila en la praktiko, ankaŭ kiam temas pri la gazetaro, ni starigis danan-esperantan gazetaran oficejon. Ni serĉas artikolojn de ĉiuj landoj (pri ekonomio, komerco, scienco, arto, fakoj, politiko, kulturo, junularo, turismo ktp.) aktualajn raportojn (gravaj festaĵoj, aliaj okazintaĵoj, kongresoj, naturkatastrofoj ktp., priskribojn pri regionoj, urboj, naturo, moroj, biografiojn de konataj homoj, tradukitajn aŭ originalajn literaturaĵojn, noveloj, poemoj, humoraĵoj). Ni prizorgas la tradukadon el Esperanto kaj sendas la manuskriptojn al ĉiutagaj gazetoj, fakaj ĵurnaloj aŭ semajnaj revuoj. Ni ankaŭ bezonas fotografaĵojn el ĉiu mondparto.

Jurnalistoj, verkistoj kaj aliaj Esperantistoj, kiuj volas liveri materialon, — ni ne povas ĉi tie, pro manko de loko, doni detalan priskribon — sed bonvolu skribi al ni kaj ni donos al vi ĉiujn informojn. Adreso: Redaktoro Rich. G. Nielsen, Herlufmagle, Sjaelland, Danlando.

### Esperanto kaj ŝako

Sako estas vere internacia sporto (aŭ arto), sed eĉ ĝi bezonas vivan interkomunikilon, kaj tiu estas nia Esperanto. Multaj ŝakistoj jam uzas Esperanton en korespondo kun amikoj el aliaj landoj. Jam antaŭ milito okazis kelkaj korespondturniroj de ŝakistoj-esperantistoj, sed la milito ilin ĉesigis. En 1946 estis starigita Esperanto-fako ĉe ICCA (The International Correspondence Chess Association — Internacia korespondŝaka ligo). Tiu Esp.-fako organizas korespondturnirojn de ŝakistoj-esperantistoj kaj interŝtatajn luktojn. Funkcias jam 7 grupoj de korespondturniro kaj unu interŝtata lukto. Ĉiu grupo de korespondturniro havas 7 ludantojn el 6—7 landoj. En ĝisnunaj grupoj estas reprezentataj jam 14 landoj. Aliĝkotizo estas 5 angl. ŝilingoj (pro devizaj malfacilaĵoj pagota laŭ interkonsento kun turnirgvidanto). Aliĝojn akceptas turnirgvidanto, Dro V. Faigl, Zlonice, Ĉehoslovakio. Nova grupo ekludas tuj, kiam aliĝas bezona nombro de partoprenontoj (laŭ nunaj spertoj tio estas ĉiumonate). Atentigu viajn amikojn je tiuj turniroj! Preparata estas turniro de landaj ludantaroj (po 6—10 ŝakistoj).

### Glitlumoj

En la daŭro de la atomesplorado eltroviĝis du novaj elementoj. Ili estas pli pezaj ol la elementoj Neptunium kaj Plutonium aplikataj ĉe la farado de atombomboj.

*

Al la fiziologo Alexandro Bogomolez en Kiev sukcecis, el la histo kaj ostocerbo de ĉevalo eltrovi ekstrakton nomitan sero „ACS". Ĉi tiu sero baras la agadon de la tielnomitaj „manĝegaj ĉeloj", kiuj atakas la histon de maljunaj homoj. Bogomolez esperas per la aplikado de la nova sero longigi la homan vivon ĝis 150 jaroj.

*

El maralgoj oni fabrikas en Anglujo novan fibrinon, kiu estas ŝpin- kaj teksebla kaj imuna kontraŭ alkalio, krome ĝi estas nebrulebla. Tial ĝi precipe taŭgas por la fabrikado de pezaj teatraj kurtenoj, por ŝirmvestaĵoj kaj similaj teksaĵoj.

*

En la jaro 1947, la brita montgrimpanto Eric Shipton planas novan provon por superi Mount Everest, la plej altan montpinton de la tero. Shipton jam entreprenis kvar provojn por suriri la pinton de Mount Everest. Lastfoje li atingis altecon de 8540 metroj.

# Verbandsmitteilungen

**Benennung einer Verkehrsfläche in bezug auf Esperanto**

Auf Grund eines Ansuchens wurde der Österreichische Esperantisten-Verband durch ein Schreiben des Wiener Magistrates verständigt, daß die Benennung einer Wiener Verkehrsfläche (Gasse, Platz) nach dem Erfinder des Esperanto für eine geeignete Gelegenheit in Vormerkung genommen wurde.

**Theaterkarten-Ermäßigung**

**Das Theater am Schönbrunnertor in Wien (Weigl) gewährt allen Mitgliedern der AEF und der Gesellschaft der Freunde des Esperanto gegen Vorweis ihrer Mitgliedkarte eine 50%ige Ermäßigung des Eintrittspreises.**

**Esperantoveranstaltung in Kufstein, Tirol**

Am 1. 2. 1947 fand im Kaffee-Restaurant Auracher, Kufstein, eine Veranstaltung der Esperantoklube Kufstein und Wörgl statt. Man konnte dies eher als ein Treffen der Tiroler Esperantisten bezeichnen, da aus allen Bezirken Tirols Esperantisten und Freunde des Esperanto herbeiströmten.

In einer eindrucksvollen Rede legte der Obmann des E-Klubs Kufstein, Dr. Alfons Huber, die Ziele der Esperantobewegung dar: Verständigung mit allen Nationen, Hilfsbereitschaft und Freundschaft mit jedermann, der guten Willens ist. Um das zu erreichen, ist die Überbrückung von Gegensätzen durch eine einheitliche Sprache, die zum besseren gegenseitigen Verstehen führt, unbedingt notwendig. Die Esperantosprache ist hiezu das geeignete Mittel für eine Weltsprache.

Landesleiter der AEF in Tirol, Herr Hans Steiner aus Kirchbichl, hielt ebenfalls eine Ansprache voll Idealismus und voll Glauben an die Menschheit.

S-ano Steiner ist es, der in unermüdlicher und uneigennütziger Tätigkeit nicht erlahmt, die Esperantoidee von Ort zu Ort zu tragen; er scheut keine Zeit, um immer wieder Sprachkurse abzuhalten und kann somit als Wegbereiter der Esperantobewegung in Tirol gelten. Die Erfolge solch idealen Strebens bleiben auch nicht aus, und der Verlauf dieses vom Klubobmann Dr. Huber und seinen Mitarbeitern organisierten Abends zeigte deutlich, daß Esperanto und die Idee des Friedens unter den Völkern miteinander eng verbunden sind.

Unter den derzeitigen Verhältnissen war es gewiß nicht leicht, eine solche Veranstaltung zu machen, aber dank der unermüdlichen Werbearbeit des Landesleiters Herrn Steiner, des Klubobmannes Dr. Huber und vieler andrer Esperantisten ist es doch gelungen, dieses harmonische Fest zu schaffen.

Das Begrüßungstelegramm der AEF-Zentrale in Wien kam wegen Postverspätung leider erst nach dem Feste an, doch wir freuen uns, daß Wien dadurch zumindest im Geiste an unserer Veranstaltung teilgenommen hat.

Nach dem offiziellen Teil zeichnete Lust und Freude das Fest aus, wozu die Besitzer des Restaurants Auracher durch Bedienung und Sorge um das leibliche Wohl der Festgäste redlich beitrugen.

Neuanmeldungen zum E-Klub, die Anfragen wegen neuer Lehrkurse beweisen, daß die Esperantoidee nicht nur Idee bleiben wird, denn:

„Esperanto bringt Frieden und Glück
auf Erden,
drum laßt uns alle Esperantisten werden!“

**Maskenball in Oberpullendorf unter dem grünen Stern**

Die E-Gruppe Oberpullendorf, Burgenland, veranstaltete am 1. 2. 1947 unter ihrem rührigen Obmann Herrn

Rainer einen Maskenball in sämtlichen Lokalitäten des Gasthauses M. Domschitz. Von besonderem Interesse ist, daß die Einladungen hiezu v i e r s p r a c h i g gedruckt wurden, und zwar in Deutsch, Esperanto, Ungarisch und Kroatisch. Außerdem waren sie mit dem grünen Esperantostern versehen. — Wir beglückwünschen unsere burgenländischen Freunde zu dieser Veranstaltung, die gleichzeitig eine propagandistische Wirkung für Esperanto hatte.

**Rückporto beilegen!**

**Aus den Kreisen von Einzelesperantisten und Esperantofreunden kommen unzählige briefliche Anfragen an das Sekretariat der AEF. Das Porto für die Beantwortung eines einzigen Briefes aber kostet rund ein Viertel bis ein Drittel e i n e s m o n a t l i c h e n Mitgliedsbeitrages von nur 50 g an die Zentrale.**

**Daher können in Hinkunft schriftliche Anfragen an das Sekretariat, das Esperanto-Institut oder die Redaktion n u r m e h r g e g e n R ü c k a n t w o r t m a r k e erledigt werden.**

**Mitgliederlisten genau führen!**

Der Bearbeiter der Zentral-Mitgliederkartei mußte die Feststellung machen, daß einige Gruppen der ordentlichen Führung der Mitgliederlisten nicht die notwendige Aufmerksamkeit schenken.

So werden z. B. die Namen und Adressen der Mitglieder mitunter nur auf einem unscheinbaren Stück Papier verzeichnet und eingesendet. Wenn in den betreffenden Gruppen keine Beitritts-Vordrucke vorhanden sind, so müssen die Anmeldelisten außer dem Namen wenigstens die Adresse, Geburtsdaten, Beruf und Sprachkenntnisse (ob Schüler, Anfänger, vorgeschritten, perfekt) enthalten. Die verantwortlichen Gruppenfunktionäre werden daher dringend gebeten, in Hinkunft entweder die Vordrucke oder selbstgeschriebene Mitgliederlisten dementsprechend auszufüllen.

**Mitteilungen der Redaktion**

Wir bitten alle Mitarbeiter, welche Manuskripte von Übersetzungen einsenden (Gedichte, Erzählungen, wissenschaftliche Artikel usw.), mit dem Übersetzungs- auch den Originaltext in der betreffenden Sprache einzusenden, da oft Zweifel wegen der richtigen Übersetzung eines Ausdruckes oder Satzgefüges entstehen und eine richtige Beurteilung oder sprachliche Korrektur ohne den Originaltext oft schwer möglich ist.

Wegen der leider noch immer bestehenden Druckschwierigkeiten infolge des Papier- und Strommangels und der dadurch bedingten Verzögerung in der Ausgabe der Revuo verlieren mitunter die eingesendeten Manuskripte ihre Aktualität und können daher nicht mehr veröffentlicht werden. Andere Manuskripte müssen wegen Raummangels für einen späteren Zeitpunkt zurückgestellt werden. Die durch die besonderen Verhältnisse bedingte zweimonatliche Herausgabe der Revuo bringt naturgemäß viele Schwierigkeiten mit sich und befriedigt weder die Leser noch die Redaktion. So sehr wir dies bedauern, sind die Verhältnisse leider stärker als unser Wunsch, in einer regelmäßig erscheinenden Revuo recht viele gute Esperantisten zu Wort kommen zu lassen, und wir bitten, dies im gegebenen Falle freundlichst berücksichtigen zu wollen.

Die in der Revuo zu veröffentlichenden Gruppenberichte werden oft zu umfangreich verfaßt. Manche Einzelheiten mögen ja für die betreffende Gruppe oder ihren Umkreis von Wichtigkeit sein, doch rauben sie Platz für andere, wichtigere Berichte der allgemeinen Bewegung. Die Redaktion ist daher gezwungen, aus zu langen Gruppenberichten nur die wichtigeren Ereignisse zu veröffentlichen und das Minderwichtige zu streichen. Um solche redaktionelle Eingriffe zu vermeiden, bitten wir die Esperantogruppen, ihre Berichte schon von sich aus etwas kürzer zu verfassen.

## Die Presse und Esperanto

**„Der Wanderer“.** Österreichische Reisezeitschrift, herausgegeben von Dir. J. Ebner, Graz, brachte in Nummer 1/1947 einen ausführlichen Artikel über Esperanto unter dem Titel: „Eine Weltsprache schlägt Brücken“, von Josef Eder.

Wir freuen uns, daß diese interessante Reisezeitschrift dem Esperanto ihre Spalten öffnete, und hoffen, daß es nicht bei diesem einen Artikel bleiben wird. Wer viel reist und in fremde Länder kommt, empfindet am besten die Notwendigkeit einer internationalen Sprache, mittels welcher er sich überall direkt verständigen könnte. Der Verein „Wanderer“ (Graz, Glacistr. 9), welcher vor dem Kriege billige Reisen nach Rom, Paris usw. veranstaltete, zählt bereits wieder 3000 Mitglieder und will für seine internationalen Verbindungen auch Esperanto verwenden. S-ano J. Eder, Referent des Vereines für Esperanto, ladet alle reiselustigen Esperantisten zum Beitritt und zur Mitarbeit ein.

Wir machen unsere Mitglieder auf diese Zeitschrift aufmerksam. Adresse: „Der Wanderer“, Graz-St. Veit 58, Steiermark. Bezugspreis jährl. S 8.—.

**„Kärntner Lehrerstimme“.** Organ der Landesgruppe Kärnten des Sozialistischen Lehrervereines Österreichs, Klagenfurt, veröffentlichte in Nummer 3/1946 einen Aufruf „Lernt Esperanto“, und in Nummer 4/1946 einen Artikel „Esperanto — eine Friedensbrücke“. — Anm. d. Red.: Wir freuen uns über die Unterstützung der Esperantoidee durch die „Lehrerstimme“ und hoffen, daß sich bald viele Lehrer und Lehrerinnen der Esperantobewegung als aktive und lehrende Mitglieder anschließen werden.

## Bibliografio

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.)

**Junaĝo,** de Anton Stieger. Pripensindaj rakontoj. El la germana tradukis F. Th. Bischof. 61 pĝ., 12×17 cm. Steffel,eldonejo, Vieno.

Lastan someron ni havis esperigan surprizon. Nove fondita aŭstria eldonejo Steffel-Verlag eldonis Esperantan tradukon de ĉe si antaŭe aperinta germana verko: Jugend. Besinnliche Erzählungen, en same bela eksterajo kiel la germanan originalon kaj donis tiel ekzemplon espereble imitotan ankaŭ de aliaj eldonejoj. La tradukinto montris, ke li kapablas venki malfacilaĵojn, kiuj neniam mankas ĉe traduko de arta verko. Jam la titolo prezentas malfacilaĵojn. Lia traduko „pripensinda“ por „besinnlich“ kaj „pripensindeco“ por „Besinnlichkeit“ (sur la lasta paĝo de la kovrilo) ŝainas al mi bona, kvankam „pripensiga“ resp. „pripensigo“ estus eble preferinda.

Lia traduko „Ĉiu nun estis komenconta sian vivovojon“ por „jeder sollte nun seinen Weg ins Leben antreten“ estas bela ekzemplo por la malofta estis — onta tempo.

Grupon da eraroj, kiujn oni povas konsideri preseraroj, mi nun mencias, por ke ili estu forigataj ĉe nova eldono:

p. 6: gruelaj anstataŭ kruelaj; p. 9: fantasio anstataŭ fantazio; p. 12: resulto anstataŭ rezulto, batŝetis anstataŭ batĵetis; p. 22: gruelege anstataŭ kruelege; p. 23: tentoj anstataŭ dentoj; p. 32: maizokrajnoj anstataŭ maizograjnoj; p. 54: maziva anstataŭ masiva.

Ĉie temas pri intermikso de voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj. Ĉu ne kulpas ĉe tiaj eraroj iel la „aŭzdria elparolato“?

Aliaj preseraroj estas ekzemple: p. 17: logis anstataŭ loĝis; p. 23: proviziita anstataŭ provizita; p. 25: pigno anstataŭ pigo; p. 48: akcelas anstataŭ alcelas; p. 51: obeinte anstataŭ observinte.

Alia grupo de eraroj kaŭziĝas per uzo de la aktiva anstataŭ la pasiva participo: p. 7: „. . . estas elborontaj miaj oreloj“ anstataŭ elborotaj (würden mir die Ohren ausgebohrt). P. 29: „estus forportonta cindro“ anstataŭ estis forportota (gab es Asche wegzu-

tragen). P. 33: „alproprajîgi al mi la kaptontajn orfiŝojn“ anstataŭ kaptotajn (mir die gefangenen Goldfische allein behalten).

Pripensinda ŝajnas al mi jena detalo pri la vorto „nadlo“. Sur p. 60 staras dufoje „abinadloj“ (Tannennadeln). Laŭ Plena Vortaro: Nadlo = pintforma metala vergeto: nadlo de elektra aparato, magneta nadlo, dum ke „pinglo“ estas ekzemple de Kabe ankaŭ uzata por pingloforma folio de koniferoj arboj. Sajnas konsilinda resti ĉe tiu distingo de la konceptoi kaj rezervi la vorton „nadlo“ por teknikaj celoj.

Fine alia sugesto por dua eldono: Se oni volas, ke la libro estu uzata kiel legaĵo en lernejoj, oni forlasu la lastan parton de la rakonto „Avido je mono“ temantan pri sekretaĵo Pariza. Ĉar pri tiaj aferoj la lernejo ne okupiĝas, sed lasas ilin al privata eventuala diligenteco de la lernantoj. Sirk.

**Folke Bernadotte: La Fino.** Miaj humanecaj intertraktoj en Germanujo printempe 1945 kaj iliaj politikaj sekvoj. Stockholm 1946. Eldona Societo Esperanto.

Ĉi tiu libro estas traduko el la sveda originalo. La aŭtoro, membro de la sveda reĝa familio, ĝisvivis la finon de la „Tria Imperio“ de la nacifaŝismo en Germanujo. Li interkontraktis kun Himmler, kaj aliaj eminentuloj de la pasinta reĝimo. La enhavo estas tre interesa kaj la traduko bonstila. La libro montras al la ne-esperantistoj, ke Esperanto en sia literaturo vivas „sur la montoj de la prezenta tempo“ kaj ne en pasinteco.

**St. St. Blicher: La pastro en Vejlbye.** Kriminalrakonto. Eget Forlag Odense (Danujo). 1945.

Malgranda novelo de la dana verkisto Blicher (naskita 1782). el la dana originalo tradukita. Ĉarmeta rakonto, ankaŭ por neperfektaj Esperantistoj.

**Ferenc Szilagyi: La granda aventuro.** Stockholm, 1945. Eldona Socieo Espeeanto.

La libro anoncita estas kolekto de prozaĵoj de nia samideano Szilagyi, kiun ni jam konas el lia libro „Trans la Fabeloceano“. Du el la rakontoj, kiujn enhavas ĉi tiu libro. estas jam presitaj en jena libro. Kiel oni devas atendi ĉe Szilagyi, la stilo estas bonega, la enhavo gaja, satira, bonhumora, kiel la vivo de la homoi mem. Ni rekomendas ĉi tiun verkon al ĉiuj gesamideanoj.

**Henryk Sienkiewicz: Kaptitaj en Nubio.** Esperantigis frato Wigbertus van Zoon. Eldonejo Jos. M. Kriinen, Vught (Nederlando).

La libro estas plimallongigita traduko de la famkonata romano „Tra la sablarejo“ de la pola romanverkisto. Du infanoj estas kaptitaj de ribelaj araboj dum la ribelo de la „Mahdi“ en egipta Sudanujo en la lastaj jardekoj de la pasinta jarcento. Ili liberigis sin mem kaj returnas feliĉe al siaj gepatroj. Bela rakonto, multe rekomendinda por gejunulaj rondoj esperantistaj.

**Aŭgusteno de Silva: Vivo de Zola.** El la portugala lingvo tradukis Manuel de Freitas. 108 p. Portugala Eldona Rondo, Monte da Lapa, 49—1. Porto (Portugalujo).

La portugalaj gesamideanoj eldonis jam kelkajn malgrandajn verkojn en Esperanto. Ankaŭ ĉi tiu libro, la vivo de la famkonata verkisto Zola, estas unu el ĉi tiuj eldonaĵoj. La libro estas bonstila kaj laŭ nia opinio ankaŭ sen lingvaj eraroj. Sed ni demandas nin, ĉu estas necese eldoni la biografion de Zola el la plumo de pli malkonata verkisto? Ni havas biografiojn de ĉi tiu franca poeto el la manoj de franclandanoj. La vivo de Zola estas rakontata simple kaj sensensacie. Ĉu ne estus pli bone por niaj portugalaj gesamideanoj, eldoni verkojn de la granda portugala literaturo, kiun ni ĉiuj treege ŝatas kaj kiujn ni tre volonte legus Esperantlingve? Cetere ni povas rekomendi la libron al ĉiuj, kiuj volas gajni rigardon pri la ekstera vivo de Zola.

D-ro E. J. Görlich.

Im Esperanto-Buchhandel und Verlag

# TRAMONDO

Wien I., Neutorgasse 9

ist soeben erschienen:

## Kantaro de la A. E. F.

enthaltend die bekanntesten Liedertexte in Esperanto, Taschenformat . . . . . S 1.50

Mit Rücksicht auf die geringe Auflagezahl (wegen Papiermangels) Bestellungen rasch aufgeben!

Außerdem sind folgende Bücher erhältlich:

„Freude durch Esperanto", Lehrbuch, von Hugo Steiner . . . S 4.—
Taschenwörterbüchlein Deutsch-Esperanto, von Hugo Steiner . S —.65
Tabeloj por intua instruado de Esperanto, von Franz Meštan . . S 1.20
„Senhalte al la celo", ein leichtes Esperanto-Lesebuch von Alois Norbert . . . . . S 2.80
„La mondo ridas", Orig.-Esp. Gedichte von Alois Norbert . . S 1.—
„La mondopaco kiel psikologia problemo", von Hans Thirring, übersetzt von Hugo Sirk . . . . . S 2.—
Enciklopedia Vortaro von E. Wüster, II., III. und IV. Teil je . . S 15.—
Maschinentechnisches Esperantowörterbuch, von E. Wüster . . S 4.—
Zamenhof-Radikaro, von E. Wüster . . . . . S 6.—
„Malgranda Korjesuo", von Marie Erard . . . . . S 1.20
„La mortado", von H. Nothnagel, übersetzt von B. Selzer . . . S 1.50
„Hat Esperanto eine Zukunft? Werbebroschüre, von Hans Jungschaffer . . . . . S —.60

Anfang Mai 1947 erscheinen:

## Esperanto, Kurzer Lehrgang in 30 Lektionen

herausgegeben vom Öst. Esperantisten-Verband

(knapp und leicht verständlich gefaßt, geeignet für kürzere Anfängerkurse) voraussichtlich . . . . . S 2.—

## Grundsätze des Fremdsprachunterrichtes

bearbeitet und herausgegeben vom Öst. Esperanto-Institut

(in Deutsch, mit Esperantobeispielen, **wichtig für Lehrer,** Lehramtskandidaten und Kursleiter) voraussichtlich . . . . . S 3.50

## Weitere Lernbehelfe

(Wörterbücher, eine Geschichte des Esperanto) **und Lesestoffe** (Originalerzählungen und gute Übersetzungen) **sind in Vorbereitung.**

**Beachten Sie auch den beiliegenden Prospekt und geben Sie ihn weiter!**

**Vbb** (Zl. 3216/1947)

**Esperantistoj!**

Subtenu vian aŭstrian Esperanto-eldonejon!

Ĉiu esperantisto aĉetu almenaŭ ĉiun kvaronan jaron unu Esperantolibron. — Bonvole rigardu la liston sur la antaŭlasta kovrilpaĝo kaj elektu ion taŭgan al vi!

Ekzemple la facila legolibro **„Senhalte al la celo“**, enhavanta interesajn legaĵojn, taŭgas ne nur por komencantoj kaj por kursoj, sed ankaŭ por perfektigo en la lingvo. Se vi legis la libron kaj ne ŝatas konservi ĝin, sendu ĝin al iu eksterlanda korespondanto kaj vi certe ricevos rekompence alian interesan libron el fremda lando. Tiel vi povas pliriĉigi viajn sciojn kaj vian bibliotekon kaj samtempe helpas al nia Esperanto-eldonejo. Do utiligu Esperanton kaj ĝian literaturon!

Mendu aŭ en via grupo (ev. komune) aŭ senpere ĉe la eldonejo „Tramondo“, Wien I, Neutorgasse 9!

## ESPERANTO-WERKE im Tauschwege abzugeben:

**P. Christaller,** Wörterbuch Deutsch—Esperanto.
**P. Bennemann,** Wörterbuch Deutsch—Esperanto.
**Dr. L. Zamenhof,** Wörterbuch Deutsch—Esperanto.
**H. Jürgensen,** Wörterbuch Esperanto—Deutsch.
**Dr. L. Zamenhof,** Fundamenta Krestomatio.
**Stark,** Elementarbuch der Esperantosprache (mit Schlüssel).
**P. Christaller,** Esperanto-Grammatik von Zamenhof.
**Aŭstria Esperantisto,** Wien, ein Führer durch Wien in Esperanto.
**K. J. Loy,** Mehrsinnige deutsche Wörter in Esperanto.

Es werden dafür philosophische Wörterbücher, Reisebeschreibungen und naturwissenschaftliche Werke u. a. im Tausch angenommen.

Anträge nur schriftlich an: F. Kraft, Wien XVIII., Währinger Straße 103.

Eigentümer und Herausgeber: Österreichischer Esperantisten-Verband. Verlag: Tramondo. Verantwortlicher Redakteur: Alfred Berdan, sämtliche Wien I., Neutorgasse 9. Druck: Holzwarth & Berger, Wien I., Börseplatz 6.